

1974 februaro

67-a jaro

n-ro 818 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



AMIKECO TRANS LIMOJ:

La mirakla mantuŝo

espereble, ke ĉi tiu numero atingas vin almenaŭ dekon da tagoj pli frue, ol la januara kaj kelkaj aliaj lastmonataj numeroj. Tio devus signifi, ke ni denove kaptis la kutiman eldonritmon kaj, ke oni kun certeco povas atendi ĝustatempan aperon de la marta numero. Ĉar estas nur la 4-a de februaro (kiam la filmoj de ĉi tiu numero iras al la presisto), apenaŭ atingis nin reagoj pri la enhavo kaj aspekto de la januara numero. Ĉu ni, laŭ konata diraĵo, konkludu, ke la silento signifas aprobon? Cetere, ni almenaŭ agas konforme al tia konkludo, kaj vi en ĉi tiu numero trovos, ne nur, ke teknikaj modernigoj (ekz. la rubriktitoloj) pli bone sukcesis, ol en la januara numero, sed ankaŭ, ke la enhavo de la numero klopodas konservi freŝecon kaj analizan rilaton al aktualaj temoj.

Enhavo

- 21 Okaze de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro: Radikoj de realismo (U. Lins)
- 23 Unesko konferencis pri la edukado de gastlaboristoj kaj iliaj infanoj: Ekspertaj pretervidoj (S.M.)
- 24 Nekrologo: Luigi Minnaja 1899 – 1974 (I. Lapenna)
- 25 Du seminarioj en Ĉikago: Akademinivelaj esploroj (R. Wood)
- 26 Budapeŝta internacieco (V. Benczik)
- 27 Sukcesa semajno en Paderborn: Aliaj argumentas por ni (U. J. Moritz)
- 28 Libro kiuj furoris en 1973
- 29 La konversacia lingvo: Valoroj de la parola vorto (J. Deer)
- 30 Lingva imperiismo diskutita en Kassel: Limigitaj konoj (J. Arandelović)
- 31 Grava paŝo en Japanujo – Feste en Prilep – Lekcio en Iowa
- 32 Recenzoj ("...Kun siaspeca spico", "Anatomio de la homa korpo", "Ekumenismo kaj internacilingva problemoj", "Secondary School Esperanto, Book 2", "Melo antaŭ tribunalo", "Viktimoj; Sur sanga tero"), Laste aperis . . .
- 35 Novaĵoj pri la 59a Universala Kongreso en Hamburgo
- 36 TEJO-paĝo: Denove pri Münster – JEFO invitas al Grésillon
- 37 Poŝtmarkvendado: Briko post briko . . . – Kalendaro
- 38 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 39 Oficiala informilo – Elektoj de komitatanoj B
- 40 Nekrologoj (Aldsten, Balda, Wiltshire) – Anoncetoj

La kovrilo



limoj – tio ne estas arkaika sed revolucia slogano. Eble pli necesa kaj pli revolucia nun, ol iam ajn antaŭe. Homo bezonas homon. Etendita mano kaj amika mantuŝo havas miraklajn potencialojn.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA) Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

Radikoj de realismo

La Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, traktante liberan cirkuladon de homoj kaj ideoj, tuŝas celon proksiman al tiu de la Esperanto-movado. Tiu ĉi artikolo refutas asertojn, ke nur nun la Movado turnas sin al la "spirito de Helsinki", kaj pruvas, ke la radikoj de tiu "spirito" havas multe pli longan historion en la Esperanto-movado.

"DE JARO AL JARO la esperantistoj — kiujn oni karakterizas kiel utopiistojn kaj revulojn — iĝas pli realistaj. Ĉi-jare ili sin apogas sur la spirito de Helsinki por antaŭenigi la universalan lingvon." Tiel skribis, en raporto pri la UK en Beograd, la franca ĵurnalo *Le Figaro*.

Ne estus surprizo, se pluraj esperantistoj, pro tiu ĉi aserto pri fina maturiĝo, komencis agrable senti ŝvelon de sia brusto. Sed ĉu tiu juĝo, eĉ se favora kaj kuraĝiga, povas nin plene kontentigi? Precipe: ĉu la aserto pri transformiĝo de la Esperanto-movado bazas sin sur korekta observo? Ĉu John Wells en sia beograda festparolado unuafoje vortumis la subtenon de la esperantistoj al io, nomebla "spirito de Helsinki"? Jam la tujsekva frazo en *Le Figaro* parte preventas tian konkludon: "Ili evidente estis en bona pozicio por aserti, ke la 'libera cirkulado de ideoj kaj homoj' ĉiam estis ilia batakrio." Tie ĉi la raportisto eble aludas al la revo de Zamenhof forigi la barojn de malamikeco inter la homoj — la revo, el kiu kreskis Esperanto kaj kiu inspiris plurajn generaciojn de esperantistoj al sindediĉa laboro. En tiu senco, la menciita punkto, enirinta la tagordon de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, efektive ne estas fremda al la esperantistoj. Ĉu ni do nun sidigu triumfe en niajn apogseĝojn kaj deklaru: "Jes, sinjoroj diplomatoj, tion ni jam delonge diradis kaj praktikadis!"?

Esperanto — interpaciga?

Tia insistado pri ĉiama pravo tamen riskas preteratenti aron da rilataj demandoj. Unue: Kiel la esperantistoj, se ili nun aklamas al Helsinki, antaŭe aliris la kontraston inter la natura sopiro al paco kaj interkompreniĝo, unuflanke, kaj la fortimige nefavoraj kondiĉoj por realigi tiun idealon, aliflanke? Kiam Esperanto naskiĝis, la ideo de monda paco estis la amata ĉevaleto de malmultaj revuloj, inter ili la esperantistoj, — afero preskaŭ dekomence kondamnita al senluziigo en mondo, en kiu senbride regis la senkompata konkuro de la imperiismaj potencoj. Mankis internacia forumo de ŝtatoj, kaj nur modestan sukceson rikoltis la provoj ellabori regulojn por arbitracia solvado de konfliktoj.

Kiun strategion klopodis sekvi la esperantistoj, en tia ĉirkaŭaĵo, en kiu eĉ nur la parolo pri internaciismo sufiĉis por elmeti ilin al suspektoj pro revoluciaj tendencoj? Ĉar la sento pri internacia solidareco estis

tiutempe forte subevoluinta, ne estas mirinde, ke la esperantistoj komence trotaksis la interpacigan rolon de sia lingvo. Kiuj, kiel ili, emis propagandi la disvastigon de Esperanto kiel memstaran vojon al paco, sen sufiĉa konsidero al politikaj realaĵoj kaj sociaj antagonismoj, tiujn ni hodiaŭ prave rigardas utopiistoj. Kiel ajn potenca stimulilo montriĝis la pionirepoka kredo, ke lingva diverseco estas la fonto de ĉia malbono, tia tezo naive ignoris la ekonomiajn kaj sociajn radikojn de la internacia malpaco kaj, sekve, ankaŭ flankenlasis la politikajn rimedojn, pli urĝe necesajn ol Esperanto, por kontraŭbatali ĝin.

Kontraŭ interŝtata anarkio

Sed, kvankam floris iluzioj pri la perspektivoj de Esperanto, favorante la eskapisman alkroĉiĝon al "interna ideo", Zamenhof mem fine de sia vivo ekkomprenis, ke unu lingvo kaj unu "neŭtrale-homa religio" solaj ne kapablos konstrui pacigan ponton inter la popoloj, ke kontraŭe, unu el la ĉefaj obstakloj de interhoma kompreniĝo estas la kulto de ekstrema naciismo. La memorando "Gentoj kaj Lingvo Internacia" al la Kongreso de Rasoj en Londono (1911) kaj, plej klare, la "Alvoko al la diplomatoj" (1915) dokumentas la konvinkon de Zamenhof, ke ne utilas nur aplombe proklami altan idealon, sed ke necesas rekte alfronti la taskon krei bazajn kondiĉojn, pli favorajn al amasa disvastigo de interfratiga lingvo. Tiun ĉi konscion pri problemoj de la ekstera mondo, apud tiu de la lingva kaoso, ni prenu kiel signon de realismo.

Pli profundan komprenon pri la interrilatoj de internacia politiko kaj poresperanta aktivado ni rimarkas ĉe Hector Hodler, la fondinto de UEA, tuj en la fino de la milito. Li bonvenigis la enkondukon de novaj juraj reguloj en la interŝtataj rilatoj, precipe la fondon de Ligo de Nacioj, samtempe tamen akcentante, kiom necesas transformi ankaŭ la spiriton de la homoj. Hodler vidis la sorton de Esperanto "intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia" kaj tial postulis, ke la esperantistoj aktive partoprenu la lukton kontraŭ la "interŝtata anarkio" — ke la "esperantismo" estu avangardo en nova, pozitiva fazo de internaciismo, kunigante *homojn* kaj ignorante la barojn de nacieco, lingvo kaj raso.

La opinio de Hodler, ke nur post establiĝo de forta internaciisma kaj socie progresema pensmaniero Espe-

ranto povos havi ŝancojn de ĝenerala akceptiĝo, ape-
naŭ estis utopia, ĉar, kiel montris la posta evoluo,
Ligo de Nacioj bankrotis nelaste pro la kompleta
foresto de ia morala forto, de ia solidareca spirito, de
minimuma kontraŭpezo al la reganta principo de nacia
suvereneco. Jam pli frue, tiun ĉi fiaskon de la Ligo kva-
zaŭ aŭguris la resono, kiun en ĝia sino renkontis la
propono por enkonduko de Esperanto en lernejojn.
Tio ĉi rilatas malpli al la fakto, ke tiu propono ne estis
akceptita, ol al la harstarigaj argumentoj ĵetitaj kontraŭ
la lingvo kaj al la senvuala rifuzo de iuj delegitoj entu-
te rekoni la bezonon de rekta komunikado inter la
popolamasoj. "Oni timis pli homaran kampon", estis
la lakona komento de Privat.

La homaj rajtoj

Post la nekontentiga rezulto ĉe la Ligo, la plimulto de
la esperantistoj, bedaŭrinde, anstataŭ memori la vor-
tojn de Hodler, refalis en la memtrompan iluzion, ke
— ĉar perdiĝis la fido je diplomaciaj metodoj — "la
plej bona metodo pacigi la popolojn estas la esperan-
tista metodo". (Kio signifis, interalie, silenti pri ĉio,
kio ne promesis, ŝajne, tujan profiton al Esperanto.)

La persekutoj kaj la milito, tamen, instruis amaran, sed
utilan lecionon ankaŭ al UEA. La respekton de homaj
rajtoj ĝi statute fiksas vivnecesa antaŭkondiĉo de sia
tuta agado, kaj sian apogon al la principoj de Unuiĝin-
taj Nacioj ĝi pruvis per multnombraj iniciatoj, el kiuj
rezultis i.a. la konata rezolucio de Unesko en 1954.
Ne temis pri papaga eĥado de belvortaj deklaroj, nek
pri senprofila kungalopado en *kampanjoj* kaj *jaroj*,
proklamitaj de UN; UEA ne anstataŭigis sian senko-
loran neŭtralismon per fervora UN-ismo, kiel rezonis
iuj novtipaj utopiistoj. Kontraŭe, UEA ĉiuokaze
insistis pri siaj apartaj interesoj: Ĉar, kvankam la Uni-
versala Deklaracio de Homaj Rajtoj markas decidan
etapon en la direkto al tiu humanisma spirito, kies
formiĝon Hodler, vane, atendis jam de Ligo de Nacioj,
la plifaciligado de la interhomaj rilatoj restis afero ne-
glektata de UN. Kiel reprezentejo de registaroj, UN,
kvankam pli utila ol supozigas ĝia prestiĝo, ankoraŭ
troe restas aparato por konservi nur la nunan staton
de "malmilito".

Pro tio estas signifoplene, ke la Konferenco pri Seku-
reco kaj Kunlaboro, nun daŭrigata en Ĝenevo, pritrak-
tas ne nur la demandojn de sekureco kaj interŝtata
ekvilibro, objektoj de la klasika diplomatio, sed ke por
la unua fojo diplomatoj kaj ministroj decidis meti
inter la traktotajn temojn ankaŭ la faciligon de homaj
kontaktoj. La konscio hezite gajnas terenon, ke, unue,
sekureco kaj kunlaboro formas nedivideblan unuon
kaj ke, due, ne eblas efika kunlaboro, se ĝi restas limi-
gita al rilatoj inter ŝtatoj (kaj eta elito de lingvokapab-
laj intelektuloj) — sen kontaktoj inter la civitanoj de la
ŝtatoj, sen pli da informoj kaj informiteco trans la
limojn.

La temo, do, estas la transponado de malstreĉiĝo al la
ĉiutaga vivo de la popoloj, la partoprenigo de la amasoj

en la procedo de internacia proksimiĝo. Ni memoru,
ke tiu ĉi postulo — ke vera malstreĉiĝo ne povas efek-
tigi je la kostoj de senpera kontaktado inter divers-
naciaj homoj kaj ke interŝtata akordiĝo ne estas fina
celo, sed antaŭŝtupo al ebligo kaj plivastigo de homa
komunikado — fakte tiriĝas kiel ruĝa fadeno tra multaj
deklaroj de aŭtoritataj reprezentantoj de la Esperanto-
movado, ekde kiam Zamenhof estis profunde kortuŝita
pro la "benata" tago, dum kiu "inter la gastamaj mu-
roj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun an-
gloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj". Estis
signo de realeco, se Hodler atentigis (en 1919), ke
"vivpova estos tiu Ligo de Nacioj nur, se ĝi kunigas ne
sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe
popolojn per spirito de reciproka kompreno". Kaj la
plej proksiman formulon de tiu simpla vero, nun ag-
noskata eĉ de politikistoj, trovis Lapenna (en Bruselo,
1960): "...malmulto estis kaj estas farata por inter-
kompreniĝo sur nivelo plej malalta, sed plej grava, la
nivelo de la ordinaraj homoj. ... Ĉiam temis kaj temas
nur pri la kunekzistado de la ŝtatoj kaj multe malpli,
aŭ eĉ neniom, pri la amika, paca kunvivado de la
popoloj, de la ordinaraj homoj." Tiaj vortoj celis emfa-
zi la necesan interligiĝon de du evolulinioj: la klopod-
oj de registaroj por tutmonda malstreĉiĝo: ekz. per
malarmado kaj kultura interŝanĝo, al kiuj la esperan-
tistoj, se realistaj, donis sian apogon, kaj la strebado
al interhoma komunikado, kiun ili petis ne forgesi en
la ekscita atmosfero de interŝtataj konferencoj aŭ lasi
submergiĝi en torento de propagandaj sloganoj.

Kiom ni atendu nun?


Hodiaŭ ni ne povas antaŭvidi, kiam finiĝos la Konfe-
renco kaj ĉu ĝi alportos kontentigan rezulton. La mal-
facilaĵoj sendube ne estas subtaksindaj. La malstreĉiĝo
en Eŭropo estas tro freŝdata kaj neelprovita, kaj la
eksplozodemaj situacioj en la ceteraj partoj de la terglo-
bo tro multnombraj, por ke oni atendu iajn miraklojn.

Estas la tasko de la koncernaj Esperanto-asocioj apliki
premon kontraŭ siaj registaroj, ke la arbedo timeme
plantita en Helsinko ne velku, ke la spirito ne restu
himerio. Necesas zorgi, ke elkoviĝu ne unu plia surpa-
pera deklaro, sed ke la graveco de homa kunproksi-
miĝo estu difinita kiel konsista parto de la celado al
sekureco kaj kunlaboro. Ne estas ĝusta kriterio, por
juĝi la Konferencon sukcesa, la fakto ke ĝi nun donas
ian atenton al la lingva problemo. Unuavice gravas, ke
ĝi ne trompu la esperojn, kiuj estas bonfide resumitaj
en la esprimo "spirito de Helsinko": ĉar sen tio, sen
libera cirkulado de homoj kaj ideoj, la Esperanto-mo-
vado estas senigita de unu el la ĉefaj antaŭkondiĉoj
por sia sukcesa disvolviĝo. Sed: Se la noblaj idealoj
estos klare formulitaj kaj jure cementitaj, tiam refoje
venos la vico al la esperantistoj, levi sian voĉon por
admoni, ke ĉiu espero pri proksima kunlaboro inter
homoj kaj libera interŝanĝo de opinioj *sen* solvo de la
lingva problemo — ja restas utopio.

Ulrich Lins

Ekspertaj pretervidoj

LAŬ RAPORTO de *Unesco Chronicle* (decembro 1973), fine de oktobro, en la sidejo de Unesko en Parizo, konferencis grupo de ekspertoj, kun celo pristudi la edukadon de eksterlandaj gastlaboristoj kaj iliaj infanoj kaj ellabori perspektivan planon tiurilate. Partoprenintoj de la konferenco reprezentis dek landojn: Alĝerio, Francujo, FR Germanujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Malio, Nederlando, Svedujo kaj Svislando. Surbaze de raportoj, venintaj el ses landoj, la grupo klopodis sintezi la variecon de problemoj kaj difini principojn, kiuj servu kiel bazo de planata aktivigo de Unesko en tiu ĉi kampo.



Montriĝis, ke ne estas malfacile atingi teorion samopinion pri la postulo, ke ĉiuj infanoj de la eksterlandaj gastlaboristoj havu liberan aliron al ĉiuj specoj de edukado, sed samtiel ne necesis peni por konkludi, ke la klopodoj realigi tion — naskas amasegon da praktikaj problemoj. Kvankam tiurilate jam ne ekzistas teoriaj aŭ juraj problemoj, en FR Germanujo kaj Francujo ekz., kie la edukado de gastlaboristaj infanoj estas deviga, samkiel tiu de la infanoj de la propraj civitanoj, la aplikado de la koncernaj leĝoj daŭre kapricas per novaj kaj pliaj problemoj. En ĉi tiuj du landoj, samkiel en Nederlando, Svedujo kaj Svislando, la praktiko devigis la edukajn aŭtoritatojn krei, apud la kutima eduksistemo, iaspecan akompanan strukturon, kiu devus kontentigi apartajn bezonojn de la infanoj de gastlaboristoj. Temas pri la t.n. preparaj klasoj, intensaj kursoj de la lingvo de la gastiganta lando, kursoj de la gepatra lingvo, hejmlandaj historio kaj geografio, specialaj aranĝoj por la infanoj, kiuj pro translokiĝo de siaj gepatroj malfrue aliĝas al la lerneja jaro ktp. Surbaze de la ĝisnunaj spertoj, la ekspertoj, konferencintaj en Parizo, menciis kiel “idealan solvon” starigon

de eksperimentaj internaciaj lernejoj, kiuj aldone al la normala edukado de gastlaboristaj infanoj (en la regulaj lernejoj de la lando en kiu oni troviĝas) donus al ili ankaŭ t.n. dulingvajn lecionojn kaj dukulturan edukon, ĉion ĉi dum minimume kvar aŭ kvin instruhoroj semajne. Estis akcentite, ke la realigo de la rajto pri eduko — por solvi ĝian finan flankon — komprenigas ankaŭ la rajton ricevi stipendion kaj alispecan finan subtenon, same kiel oni tion aplikas al la infanoj de la propraj civitanoj. Montriĝis, nome, ke pluraj landoj, dungantaj gastlaboristojn, ne uzas la saman metron kiam temas pri la propraj kaj gastlaboristaj infanoj.

La pariza konferenco dediĉis multe malpli da atento al la plua edukado de la eksterlandaj gastlaboristoj mem, eble pro la fakto, ke ĝi prezentas problemojn, multe malpli facile solveblajn, ol estas tiuj koncernantaj la infanojn. Nome, oni ankaŭ en Parizo konstatis, ke la gastlaboristoj por kia ajn daŭrigo de sia edukado, kaj temas ĉefe pri fak-edukado, devus anticipi bone koni la lingvon de la lando en kiu oni laboras. La kono de la lingvo ne rilatas nur al la plua edukado, sed ĝi rekte koncernas ankaŭ la perlaboron, la sekurecon ĉe la laborloko, la sen lingvokono nerealegeblan akiron de pli bona kaj pli facila laboro, por kiu oni eĉ povus havi pli ol necesajn kvalifikojn. Oni emfazis, ke nur Svedujo, per leĝo voĉdonigita en la Sveda Parlamento en 1972, devigas la labordonantojn pagi 240 horojn, dum kiuj la gastlaboristoj frekventas kursojn de la sveda lingvo.

Tuŝitaj estis ankaŭ problemoj aperantaj kiam gastlaboristo reiras al sia hejmlando. Laŭ opinio de la ekspertoj, la landoj kiuj eksportas laborforton devus fari pli multajn kaj pli bone organizitajn klopodojn, kiuj celus plifaciligon de la reintegrigo de la revenantaj gastlaboristoj kaj iliaj familioj en la hejmlandan socion. Dum la konferenco, unu el la oficialuloj de Unesko diris ankaŭ jenan frazon: “Ĉi-specaj entreprenoj sendube kontribuas al la plenumiĝo de unu el la bazaj idealoj de Unesko: pri tiu ekstermo de rasismo, kiu tiel multe malutilas al la kompreniĝo inter la popoloj kaj al la internacia kunlaboro.”

Kompreneble, ke necesas senrezerve saluti la fakton, ke al la tagordo de Unesko entute venis la problemoj, kiuj rilatas la edukadon de gastlaboristoj kaj iliaj infanoj, des pli, ke tiuj problemoj ofte estas multe pli grandaj kaj gravaj ol ŝajnis al la en Parizo kunvenintaj ekspertoj. Tamen, malgraŭ tio, ke kia ajn entrepreno rilate la traktitajn problemojn efektive estas bonvena,

oni ne rajtus preteratenti la kernon de la problemaro, tiel kiel farite ĝuste de la ekspertoj dum la pariza konferenco. Ne necesas aparta kuraĝo por aserti, ke almenaŭ en tiu ĉi parto de la mondo kaj en konferenco kun tiaj partoprenintoj apenaŭ aŭ tute ne temas pri rasismo. La vera fonto de la problemoj estas diskriminacio, ne rasa sed lingva, kiel UEA prave atentigis per aparta dokumento la konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj pri la sama temo. La lingva diskriminacio ne estas ekstermebla, eĉ ne mildigebla, per paŝoj similaj al tiuj kiujn rekomendis la ekspertoj dum

la konferenco pri la edukado de gastlaboristoj kaj iliaj infanoj. Antaŭ ol ekstermi la verajn kaŭzojn de la malprivilegia pozicio de la eksterlandaj laboristoj kaj iliaj infanoj, oni ja devas rekoni la ekziston de tiuj kaŭzoj, oni devas kompreni, ke diskriminacio estas ankaŭ la proponata solvo pere de "dulingva" kaj "dukultura" edukado. Ĝis Unesko faros tiajn bazajn distingojn, ĉiuj ĝiaj noblaj celoj kaj idealoj — restos nur celoj kaj idealoj, kaj la grandegaj sumoj elspezataj por ekspertoj, kiuj studas la problemaron, estos malprudente investita havaĵo de la homaro.



Nekrologo

Luigi Minnaja

1899 – 1974

JUS ATINGIS MIN la malĝojiga informo, ke la 28an de januaro forpasis en Romo Luigi Minnaja, unu el la plej aktivaj kaj sindonaj agantoj por la Internacia Lingvo en Italujo kaj kaj ankaŭ vaste ekster ĝiaj limoj.

Luigi Minnaja naskiĝis la 21an de januaro 1899 en Pisticci. Li ellernis Esperanton en 1926 kaj restis fidela al la lingvo kaj al la idealoj, ligitaj al ĝi, ĝis la lasta momento de sia vivo. Dum multaj jaroj li estis sekretario de la loka Esperanto-grupo en Romo kaj entute la ĉefa aktivulo, kune kun s-ino Carolina Minnaja, en la ĉefurbo de Italujo. Li fariĝis membro de UEA kaj senĉese laboris por la Asocio, interalie kiel delegito en Romo kaj peranto kaj ĉefdelegito por Italujo de 1945 ĝis 1969, kiam pro la ne tre bona sano li retiriĝis de tiu funkcio. Dank'al la klopodoj de gesinjoroj Carolina kaj Luigi Minnaja komenciĝis la elsendoj de Radio Romo en 1950. Ili plu daŭras. Gesinjoroj Minnaja dum multaj jaroj, preskaŭ tute solaj, prizorgis la programon kaj la disaŭdigojn.

Luigi Minnaja estis tre aktiva ankaŭ kiel tradukanto. Unu el la plej gravaj atingoj inter la du mondmilitoj estis la publikigo de la belega Gvidlibro pri Romo, kiun eldonis la Itala *Touring Club*, sed kiu bedaŭrinde jam delonge elĉerpiĝis. La tradukon kaj la bonegan glosaron prizorgis Carolina kaj Luigi Minnaja. Al tiu grava kampo ambaŭ dediĉis multe da tempo kaj talenta laboro. Ilia lasta verko estas la traduko de *Renkonto kun Trentino*, riĉe ilustrita libro, publikigita la pasintan jaron, okaze de la itala landa Kongreso de Esperanto en Trento.

En la familio Minnaja nur Esperanto estis kaj estas uzata. Ambaŭ filoj, d-ro Carlo kaj d-ro Nicola estas denaskaj esperantistoj. Ekde la jaro 1950, kiam mi por la unua fojo estis en Romo kaj vizitis la gastaman hejmon Minnaja, mi preskaŭ ĉiujare renkontis gesinjorojn Minnaja ĉu en ilia hejmo, ĉu aliloke. Neniam mi aŭdis unusolan italan vorton. Mi rememoras, ke foje, antaŭ multaj jaroj, okaze de renkontiĝo en Kastelo Grésillon, la gepatroj en la apuda ĉambro riproĉis al Carlo, tiam ankoraŭ junuleto, iom tro aŭdacan bicikladon en la stratetoj de la urbeto. Kaj Carlo, kompreneble, defendis sin. Ankaŭ tiu familia disputeto estis en Esperanto. Same la korespondado. La lastan septembron mi mem vidis leteron de Carlo al la gepatroj pri la Kongreso en Beograd, kompreneble en Esperanto. Ankaŭ tiurilate la familio Minnaja povas esti modelo por multaj gepatroj, kiuj scias la lingvon. En la Esperanto-movado la familio Minnaja fariĝis koncepto.

Kiel homo Luigi estis senfine ĝentila, afabla, helpema kaj klera. Ĉiuj, kiuj havis la grandan privilegion persone konatiĝi kun li, spertis tion.

La forpaso de Luigi Minnaja estas ne nur profunde doloriga por sinjorino Carolina Minnaja, la filoj kaj la tuta familio, sed signifas ankaŭ grandan perdon por la Esperanto-movado. La memoro pri li daŭre vivos.

Plej korajn kondolencojn en la nomo de Universala Esperanto-Asocio kaj plej amikan personan kunsenton al sinjorino Carolina Minnaja kaj al la tuta familio.

Ivo Lapenna

Akademiniivelaj esploroj

OKAZE DE LA 88a jara kunveno de Modernlingva Asocio de Usono – MLA (Modern Language Association of America), de la 27a ĝis la 29a de decembro 1973, realiĝis du seminarioj, po du horoj, enkadre de la oficiala programo. Temas pri la dua sinsekva seminario “Esperanta Lingvo kaj Literaturo” kaj la unua seminario “Interlingvistiko”. La daŭrigo de la Esperanta studgrupo, kaj la enkonduko de la interlingvistika, estis, kiel jam konate, voĉdonita dum la 87a jara kunveno en decembro 1972 en Novjorko (vd. nian revuon febr. 1973, p. 27). Ambaŭ kunsidoj okazis en la hotelo Conrad Hilton, Ĉikago.

Esperanta Seminario

La seminarion “Esperanta Lingvo kaj Kulturo” prezidis prof. d-ro Carleton W. Carroll (fako de franca kaj itala lingvoj, Universitato Wisconsin, Madison). Al petintoj estis anticipe dissenditaj ekzempleroj de kvar referaĵoj, rilataj al la diskutemo de la seminario. Laŭ la praktiko de la organizaĵo MLA, tiuj referaĵoj ne estis laŭtlegitaj dum la kunsido, sed diskutitaj, unue de invitita diskutanto, poste de la cetera ĉeestantaro, al kies demandoj respondis la verkinto mem. La referaĵoj estis jenaj: Prof. Duncan Charters (Ŝtata Universitato Kalifornio-Humboldt, Arcata): “Aplikita lingvistiko kaj la instruado de Esperanto”. Ĝin diskutis prof. d-ro Edmund Brent (Ontaria Instituto de Edukaj Studoj, Toronto). Jen mallonga resumo de tiu referaĵo: Naiva informado al la ĝenerala publiko ofte troigas la simplecon de la lingvo kaj kaŭzas malakcepton de la plena strukturo de la lingvo, evoluinta en pli ol 80 jaroj de socia ekzisto kaj tradicio. La Esperanta pedagogio devas baziĝi sur la plena lingvo. Ĝis nun ne ekzistas lernomaterialoj akcepteblaj al profesiaj lingvistoj, nek taŭga priskribo de la parola lingvo en ĝiaj diversaj sociaj formoj kaj variaĵoj. La principoj de kontrasta analizo de Esperanto kaj la denaska lingvo de la lernanto devas esti la bazo de la instruado. La referaĵon de prof. d-ro Edmund Brent “Margeneco kaj variebleco en Esperanto” diskutis prof. d-ro Richard E. Wood (Luiziana Ŝtata Universitato, Baton Rouge): La tipologio de planlingvoj kaj de Esperanto inter tiuj estas difinebla. Necesas forigi la miton de neŝanĝebleco kaj neŝanĝiteco de Esperanto. Same necesas agnoski la variadon en la uzo de la lingvo inter diversaj grupoj, nacioj, sociaj tavoloj, ktp. Oni povas distingi inter la historie neŝanĝitaj elementoj de la lingvo kaj tiuj, en fonetiko, sintakso, vortfarado ktp., kiuj pruveble ŝanĝiĝis ekde la estiĝo de la lingvo. En la

fonema sistemo de la lingvo estas difineblaj margenaj elementoj, ekz. margenaj konsonantoj, margenaj duonvokaloj. Aparte tie oni povas atendi lingvan variadon kaj evoluon. La fakta lingva variado estis observita laŭ aĝo, sekso kaj nacieco dum lastatempa kongreso. Tiel, Esperanto iom post iom jam iĝis tipa homa lingvo plejofte nedistingebla de iu ajn alia lingvo.

Prof. d-ro Julius Balbin (Kolegio Graflando Essex, Newark, New Jersey) traktis la temon “La sekreta malsano de la Esperanta poezio”, diskutita de prof. d-ro Pierre L. Ullman (Universitato Wisconsin, Milwaukee). Diskutinda estas la lastatempa prelego de Jean Forge pri la Esperanta poezio. Oni komparu lian starpunkton kun tiuj de Kalocsay kaj de Brendon Clark (*Kien la poezio?*). Aparte neakceptebla estas la aserto de Forge, ke *adasismaj* rimoj estas neuzindaj. Tiaj rimoj estas ja uzataj de la plej bonaj Esperantaj kaj nacilingvaj (ekz. hispanaj) poetoj. La malsano de la Esperanta poezio estas la konservemo, aparte forma kaj struktura, de la poetoj. Ekkaptinte revolucion ideon – de neŭtrala mondlingvo – la Esperantaj poetoj tamen sekvas ege konservemajn strukturajn modelojn. Mankas aŭdaco kaj forto. Ni ĉiam kuŝas sub la lirika, romantika ombro de Zamenhof kaj Grabowski. Foriginte la lingvan turon de Babelo, ni restas tamen en stila kaj emocia ebura turo.

Prof. d-ro Pierre L. Ullman analize referis pri “La frida, erotike minacita kosmo de *Malvirgigo*, de Baldur Ragnarsson”, kies pridiskuton enkondukis d-rino Margaret G. Hagler (Kolegio Lincoln Land, Illinois). Resumo: La islanda poeto Baldur Ragnarsson fontas el jarmila islanda poezia tradicio kaj estas agnoskita poeto en sia nacia lingvo. En la Esperanta poemo *Malvirgigo* sentebblas la frideco de la islanda vintro kaj eldormigo kaj seksa vekiĝo de la alveno de la printempo en glacia, vulkana lando. La rimaro kaj vortaro de mallonga poemo atestas la poezian vidkapablon de la verkinto. El sia ege persona geografia kaj pensa hejmo, Baldur Ragnarsson donacis juveleton al la monda literaturo.

Interlingvistika Seminario

La kunvenon “Interlingvistiko” prezidis prof. d-ro Richard E. Wood. Estis dissenditaj du referaĵoj.

S-ro Frank Esterhill, direktoro de Interlingua-Instituto, Novjorko, referis pri “Estiĝo de la interlingvo: Interlingua, la tut-okcidenta formuligo”. Diskutis prof. Duncan Charters. Mallonga, pamfleteca prezento de

la historio de planlingvoj kaj de Interlingua, kun diversaj nepozitivaj aludoj al Esperanto. En sia kritiko prof. Charters atentigis al pluraj mistradukoj kaj misprezentoj de Esperantaj vortoj, atestantaj pri ĝenerala dilettantismo en la verkado de la referaĵo. Li ankaŭ kontrastigis la funkciantan socian lingvan fenomenon Esperanto kun la skema, neplene ellaborita projekto Interlingua, kies utilo limiĝas al nur unu el la kvar celoj de normala lingva pedagogio — la pasiva legokapablo, kaj eĉ tio nur por okcidentanoj. Nek la inventinto de Interlingua nek liaj sekvantoj parolas ĝin; ĝia parolebleco estas dubinda.

La duan referaĵon preparis prof. d-ro Julius Balbin: “Ĉu Esperanto estas artefarita lingvo?”, kaj diskutis prof. Pierre L. Ullman.

Inter la ĉefaj teoriaj lingvistoj, kiuj aludis al la graveco de Esperanto kaj al la lingvistika fenomeno, kiun konsistigas ĝia ekzisto kaj akiro de socia bazo, estas André Martinet kaj Jan Baudouin de Courtenay. La uzo de la vorto “artefarita” rilate al Esperanto fontas de Zamenhof mem. Sed jam en 1908 Baudouin de Courtenay, en sia fama defendo de Esperanto kontraŭ la argumentoj de Brugmann kaj Leskien, metis la vortojn “natura” kaj “artefarita” en citilojn, kaj emfazis, ke la lingvo ekzistas por la homo kaj ne inverse, kaj ke la homo havas la rajton plibonigi siajn lingvajn ilojn kaj eĉ ilin plene interŝanĝi. Pli precize estus, uzi la terminon “artefarita” nur por nevortaj sistemoj de logika sintakso aŭ komputila lingvo.

Richard E. Wood

Budapeŝta internacieco

EN LA UNUAJ TAGOJ de novembro 1973 komenciĝis neĉiutaga Esperanto-kurso en Budapeŝto, en la studenta domo de TESCO (Institucio de Internacia Teknika kaj Scienca Kunlaborado). En Hungarujo tiu ĉi Institucio okupas sin pri la antaŭ kaj postuniversitata instruado de junuloj el la Tria Mondo.

En la kurso partoprenas 24 junuloj el 14 landoj: Bangladeŝo, Peruo, Kamboĝo, Suda Jemeno, Libano, Etiopio, Panamo, Kubo, Urugvajo, Gvineo-Bissau, Gvineo-Conakry, Sudano, Cipro kaj Alĝerio. Oni uzas la noveldonitan lernolibron de Szerdahelyi: *Esperanto Internacia*. La kurson gvidas s-ino Éva Farkas-Tatár. La 15an de decembro en la moderna studenta domo okazis Zamenhof-festo. La ĉeestantojn — inter kiuj krom hungaraj esperantistoj troviĝis ĉ. 60 ekster-eŭro-



Eksterlandaj studentoj en Budapeŝto serĉas solvon por sia propra lingva problemo.

paj studentoj — bonvenigis la direktoro de la studenta domo György Marián, kiu emfazis la gravecon de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Li skizis la gravajn lingvajn problemojn, kiujn prezentas laboro en tiaspeca institucio. Li anoncis, ke li mem eklernis Esperanton, kaj esprimis la deziron, ke la Internacia Lingvo baldaŭ fariĝu “hejma lingvo” de la studenta domo.

En la nomo de HEA kaj HEJ la ĉeestantojn salutis f-ino Éva Tofalvy kaj Sándor Jakab. Poste Hector Villarroel (boliviano), prezidanto de la studenta estraro transdonis libropremiojn al la plej diligentaj kursanoj.

La sekva ero estis esperantlingva kulturprogramo de la kursanoj. Tiu ĉi programo estis vere internacia: la program-anoncanto estis Long Visalo el Kamboĝo. Plej elstaraj programeroj estis la jenaj: José António Correia el Gvineo-Bissau deklamis la poemon de Baghy: *Sklavokanto*, Haile Negash el Etiopio prezentis la poemon *Sud-Afriko* de Edwin de Kock. Sandalio Ramirez el Urugvajo deklamis *Zamenhofan Baladon* de Kalocsay.

La kulturprogramon sekvis amika renkontiĝo inter la hungaraj kaj novbakitaj eksterlandaj esperantistoj. Multaj eksterlandaj studentoj, kiuj partoprenis la feston kiel gastoj, informiĝis pri la ebleco eklerni la lingvon. La direktoro de la studenta domo aranĝis malgrandan akcepton por la esperantistaj gvidantoj, kaj okazis pluraj konkretaj interkonsentoj pri estonta kunlaborado. György Marián emfazis, ke estas necesaj pluaj kursoj, kaj anoncis, ke la studenta hejmo transprenas ĉiujn kostojn, kiel oni ankaŭ ĝin nun faris. La dua kurso verŝajne ekfunkcios fine de januaro.

La estraro de la studenta domo petas esperantistojn el anglalingvaj, franclingvaj kaj hispanlingvaj regionoj alsendi propagandan kaj instru-materialon, ja la plimulto de la studentoj malbone, aŭ tute ne regas la hungaran lingvon. La sendaĵojn oni bonvole adresu al: Studenta domo TESCO (por s-ro Haile Negash), Budapest XIV, Nagy Lajos Király út. 102. Hungarujo.

V. Benczik

Aliaj argumentas por ni

En la Movado oni malfacile trovas pli aktivan pedagogon ol estas Hermann Behrmann, la gvidanto de la ILEI-sekcio en FR Germanujo. Lia lernolibro (aŭ eble pli trafe: lernometodo) "Esperanto programita" vekis antaŭ kelkaj jaroj, kaj ankoraŭ vekas, grandan interesigon, ne nur en lia propra lando, sed eĉ ekster ĝi, ekster Eŭropo plurfoje. Nun okazas io simila kun la nova kampanjo de Behrmann — aranĝado de intensaj lingvolaboratoriaj Esperanto-kursoj, plej ofte en universitatoj kaj altlernejoj. Ni ĉi tie raportas pri la lasta sukceso de Behrmann, komence de januaro, en la Universitato de Paderborn. Krome, la inaŭguro de tiu kurso enhavis aparte interesan elpaŝon de neesperantisto, profesoro en la Universitato, kvankam oni pri la graveco kaj eĥoj de tiu elpaŝo certe ankoraŭ aŭdos pli poste.

OKAZE DE LA INAŬGURO de la intensa lingvolaboratoria E-kurso en Paderborn, Nordrejn-Vestfalio, FR Germanujo, la 2-an de januaro 1974, d-ro Helmar Frank, profesoro pri cibernetika pedagogio en la Universitato de tiu urbo, faris paroladon pri siaj antaŭ nelonge verkitaj "Tezoj por germana lingvo-politiko". Prof. d-ro Frank, membro de la Liberal-Demokrata Partio (germana mallongigo: FDP), sciencisto kaj — feliĉe — neesperantisto, prezentas kiel taskon de la germana politiko, sur lingvo-kultura kampo, la protektadon kaj sekurigon de la pozicio de la germana lingvo tra la mondo. Li postulas la samon por ĉiuj aliaj lingvoj kaj konkludas, ke estas maleble, ekz. en Eŭropo, imagi la lernadon de ĉiuj sep lingvoj de la nunaj ŝtatoj-membroj de la Eŭropa Komunumo, fare de ĉiuj enloĝantoj de la naŭ ŝtatoj. Konsekvence, oni devas serioze studi la vojojn por enkonduko de planlingvo, ekz. de Esperanto, kiu jam estas sufiĉe enradikiĝinta por havi ŝancojn esti konsiderata perspektive. Prof. Frank sugestis en sia parolado (poste ankaŭ en aparta rondo), ke oni starigu, en la unuopaj partioj kaj ĉe kompetentaj ministerioj, studgrupojn pri tiu ĉi temaro. Li mem jam ekdiskutis la aferon kun sia partiestro Walter Scheel, la nuna ministro de FR Germanujo pri eksterlandaj aferoj.

Kvankam tiu unua publika interveno de prof. Frank, koncerne la problemon de la internacia interkompreniĝo, estis jam sufiĉe grava, la inaŭguro de la kurso havis eĉ kelkajn pliajn atentindaĵojn: Ĉeestis la direktoro de la universitata instituto pri angla filologio, salutparolis la kanton-estro de Paderborn, partoprenis direktoro de grava gimnazio, lerte salutparoladetis junaj aktivuloj el Belgujo (Peeraerts), Hispanujo (Guiñón), Italujo (La Torre), Britujo (Watts), Svedujo (Jansson), FR Germanujo (Klunder) kaj Hungarujo (Flora Szabó-Felső, prezidantino de TEJO). Tiuj ĉi eksterlandaj salutintoj kaj kelkaj germanaj ĉeestintoj venis speciale por la inaŭguro el Kassel-Zierenberg, kie — ĝis la 3-a de januaro — daŭris la 17-a Internacia



Vigilaj diskutoj en Paderborn (de maldekstre): prof. d-ro Frank, s-roj H. Klunder, H. Behrmann kaj d-ro H. Kasselmann.

Seminario de GEJ. Ĉio ĉi evidente sufiĉe impresis la gazetaron, kiu raportis (plej ofte ankaŭ kun bildoj) tiel pri la malfermo, kiel pri la rezultoj de la kurso mem.

En tiu intensa kurso (la 6-a en la sama federacia lando, la 2-a en Paderborn mem) partoprenis pli ol 30 personoj, el kiuj proksimume triono estas instruistoj, triono gimnazianoj kaj studentoj, dum la lasta triono apartenas al aliaj profesioj. La kursanoj laboris surbaze de la materialo *Esperanto programita* de Hermann Behrmann, prezidanto de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj kaj ĉeforganizinto de la kurso. Ĉar ĉiuj kursanoj jam estis prilaborintaj kelkajn lecionojn hejme, ili komencis fine de la unua kajero: Dum unu grupo, sub konsilado de f-ino Ruff, preparis siajn lernopaŝojn, la alia (sub kontrolo de la subskribinto) ekzercis sin pri la lernitaĵoj en la lingvolaboratorio. Por tiuj lingvolaboratoriaj ekzercoj Behrmann publikigis apartan kajeron, kiu enhavas ĉiujn ekzerco-modelojn kaj laborelementojn de la disponeblaj 69

sonbendoj, 15-minutaj. Oni laboris laŭ unuhora ritmo, ĉiutage de la 9-a ĝis la 12-a kaj de la 14-a ĝis la 17-a horo, do tri horojn en la preparejo kaj tri aliajn en la lingvolaboratorio. Konsiderante, ke eĉ sabaton kaj dimanĉon oni plenhore studadis, facile kompreneblas, ke la streĉo estis sufiĉe altgrada. Funkciis ankaŭ malgranda grupo de duaŝtupuloj, kiuj, gvide de rektoro Sonnabend, prezidanto de ILEI, kaj d-rino Szabó-Felső, konversaciis kaj plifirmigis siajn gramatikajn konojn.

En Paderborn oni daŭrigos la lernadon kaj la studojn: D-ro Hans Kassermann, la teknika organizinto de la kurso, cetere docento en la Universitato, gvidas perfektigan kurson, kaj prof. d-ro Frank antaŭenpuŝos, sur la politika kampo, la diskutadon pri siaj tezoj.

Uwe Joachim Moritz

Libroj kiuj furoris en 1973

LA LIBROSERVO DE UEA sendube estas la plej reprezenta vendejo de la libroj aperintaj en la Internacia Lingvo kaj ĝi, dum kelkaj lastaj jaroj, rapide proksimiĝas al guldena spezo-sumo, kiun oni notas per ses ciferoj. En la jaro 1973 la libro-vendado kreskis je plenaj 12 procentoj, kompare al la antaŭa jaro, en kiu la kresko esprimiĝis per iom pli ol 5 procentoj. Al tia rezulto tutcerte grave kontribuas la regula eldonado de la libro-katalogo, kiu, krom tio ke ĝi aperas en la Dua parto de la Jarlibro, estas havebla ankaŭ kiel aparta eldonaĵo, enhavanta ĉiujn necesajn informojn pri preskaŭ ĉiu libro momente akirebla sur la merkato.

Fariĝas jam preskaŭ tradicio, ke ni komence de ĉiu jaro resumu la rezultojn de la Libroservo, ne nur pro la kutimaj financaj bezonoj, sed ankaŭ por veni al ofte surprizaj informoj pri la eldonaĵoj, kiuj estis pleje vendataj dum la pasinta jaro. Antaŭ ol prezenti tiujn rezultojn por 1973, kaj ili estas kelkrilate surprizaj, ni atentigu, ke la rezultoj baziĝas nur je la individuaj,

unuopaj vendoj kaj, ke ilin ne eniras niaj liveroj al la revendistoj.

Inter la primovadaj eldonaĵoj, la unuan lokon okupis la broŝuro *Internacia Ekzameno – Specimenaj demandoj*, kies vendo-rezultoj reflektas la interesigon pri la Ekzameno kaj supozeble aŭguras multan laboron por la Ekzamena Komisiono dum la sekvantaj Universalaj Kongresoj. La pasintjara venkinto en tiu ĉi branĉo *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* (Dratwer) konservis ankaŭ en 1973 prestiĝan lokon, kiun iom minacas *Historio de la mondlingvo* (Drezen) kaj *La danĝera lingvo* (Lins), aperinta en marto pasintjare.


La japana eldonaĵo *Antologio de amoro* venkis en la branĉo de la originala literaturo, dum *ABZ de amo* okupis la unuan lokon inter la nefikciaĵoj. Tiujn du venkojn ni prefere ne komentu, almenaŭ ne en la komenco de la jaro 1974, kiun UN proklamis – La internacia jaro de la monda loĝantaro. Inter la originalaĵoj bonege vendiĝis ankaŭ *Vole...novele* (Schwartz), *Junuloj en torento* kaj *Infanoj en torento* (Engholm) kaj *Vojaĝo al Kazohinio* (Szathmári), dum inter la nefikciaĵoj sekvis *Sankta biblio*, la popularscienca verko *Senĝenaj dialogoj* (Fernández) kaj *Poŝatlaso de la mondo*. En la branĉo de la tradukita beletro la tronon okupis *Winnie-la-Pu* (Milne), kaj sekvis, kun sama nombro de venditaj ekzempleroj, tri verkoj: *Okupacio* (Krusten), *Kuŝanta tigro* (Promet) kaj *Kit vivas* (Lyngbirk).

En la branĉo de vortaroj, la pasintjara venkinto *Laŭtema vortaro* (Hryniewicz) migris al la dua loko, lasante la unuan al *Diccionario de bolsillo* (Paluzie-Borell). *Plena ilustrita vortaro* okupis la trian lokon, spite al sia alta prezo. Inter la lernolibroj kaj legolibroj, la plej bonajn rezultojn notis *Esperanta legolibro* (Migliorini), *Privilegia vojo* (Setälä) kaj *Paŝoj al plena posedo* (Auld).

En la branĉo de gramofondiskoj eble eĉ ne plu estas surprizo, ke la unuan lokon okupas denove *Internacia elparolo*, sed ke ĝin sekvas du aliaj ankaŭ parolaj diskoj (*Univox* kaj *ABC de Esperanto*). Konsiderante la fakton, ke kelkaj kanto-diskoj aperis nur dum la jaro, pri kiu temas, bonegajn rezultojn notis *Kantanta mia bird'*, longdaŭra disko kun britaj popolkantoj (Margaret Hill) kaj *La feliĉo* (Ramona van Dalsem), inter kiuj la unua aperis nur meze de la jaro, kaj la dua dum pluraj jaroj estis la plej vendata gramofondisko.

Fine, trudiĝas konkludo, ke la merkato de la Esperanto-libro daŭre vastiĝas, sed samtiel estas okulfrape, ke la gusto de la legantoj spertas interesajn modifojn.





Ing. Jim Deer, la Komisiito por Registrado de la Konversacia Lingvo

LA VERA KORO de ĉiu lingvo estas ĝia buŝa, parola formo. Kvankam la skriba, la presita formo havas multajn avantaĝojn rilate la rapidecon kaj ekonomion, necesas atenti, ke ĝi tamen baziĝas sur la parola vorto. Lingvistoj, kiuj deziras science pristudi la vivan lingvaĵon de la vivanta Internacia Lingvo, kaj fonetikistoj, kiuj volas analizi la ekeston kaj disvolviĝon de internaciaj normoj de prononco en Esperanto, unuavice bezonas altkvalitajn registraĵojn de la konversacia lingvo-uzo. Pro ĉio ĉi estas pli ol grave zorge registradi kaj konservi specimenojn de la parola lingvo, des pli ke la hodiaŭa sonregistra tekniko donas al ni altkvalitajn rimedojn por tion efektivigi.

En sia kunsido de la 30a de decembro 1972, la Estraro de UEA nomis min "Komisiito por Registrado de la Konversacia Lingvo", en la kadro de la Magnetofona Servo de UEA, kiun gvidas s-ro Rüdiger Eichholz. Specife, mia tasko estas registri neformalajn konversaciojn en la Internacia Lingvo kaj diversmaniere disponigi la kopiojn al la ĝenerala publiko.

Plenumante tiun komision, mi jam komencis vendi kelkajn altnivelajn kopiojn de konversacioj, kiujn mi surbendigis okaze de la 57a Universala Kongreso en Portland. Kopioj de la registritaj konversacioj eniras la stokon de la Magnetofona Servo. Listo de la ĉefaj, ĝis nun surbendigitaj konversacioj estas trovebla en la Jarlibro 1973, Unua Parto, p. 331.

Nun, komence de la jaro 1974, ni staras antaŭ la 59a Universala Kongreso en Hamburgo. Mi klopodos ebligi, ke la kopioj de la konversacia stoko estu aĉeteblaj, kontraŭ malalta prezo, dum la Kongreso. Krome, mi esperas pligrandigi la stokon per novaj interesaj konversacioj, kiujn mi planas surbendigi dum la 59a UK en Hamburgo.

Necesas scii, ke la teknike altnivela registrado de konversacioj postulas specialan ekipaĵon, interalie mikrofonojn, kiuj estas uzataj en lingvo-laboratorioj. Ĉio

LA KONVERSACIA LINGVO

Valoroj de la parola vorto

ĉi estas bezonata por elimini bruojn kaj sonojn, kiuj kutime troviĝas en la ordinaraj konversaciaj lokoj. Sekve de ĉio dirita, dum la 59a UK en Hamburgo funkcios speciala budo por la registrado de konversacioj. Por sukcesigi la aferon, mi petas kaj atendas helpon de vi legantoj, precipe se vi mem intencas veni al la Kongreso. Eble vi jam nun havas sugestojn pri eventuala konversacia paro? Se jes, bonvolu skribi rekte al mi (J. Deer, 11246 NE Hancock, Portland, Oregon 97230, Usono), minimume unu monaton antaŭ la Kongreso. Ankaŭ en Hamburgo mi bonvenigus helpon de kelkaj volontuloj, kiuj helpas trovi la konversaciontojn kaj venigi ilin al la konversacia tablo. Tamen, antaŭ ol decidiĝi pri la petata helpo, oni devus memori jenon: La ĉefa tasko de la laboro estas la registrado de interesaj, libere fluantaj konversacioj inter personoj, kiuj perfekte regas la lingvon. Cetere, unu el la celoj de la registrado estas, ke la surbendigitaj konversacioj servu kiel modeloj. Sed tamen, la registrado celas surbendigi ankaŭ kelkajn konversaciojn inter personoj, kies lingvo-uzo ne estas modela, sed kies interparolo havas ĝenerale interesan temon. Tiu-rilate oni memoru, ke ankaŭ parolante la gepatran lingvon, ni ne ĉiam povas servi kiel modelo de korekta lingvo-uzo. Aldone, oni planas registri ankaŭ konversaciojn, kiuj traktas aparte interesan sciencan aŭ fakan temon, kondiĉe ke la konversaciantoj estu renomaj specialistoj pri la temo.

Kompreneble, oni povas (kaj eĉ planas fari tion) registri ankaŭ individuajn voĉojn, kiuj legas poeziaĵon aŭ prozopecon. Ne gravas, ĉu temos pri originala aŭ tradukita verko. Samtiel, povus montriĝi valore surbendigi ankaŭ dramajn tekstojn, kvankam necesas memori, ke la disponebla aparataro havas nur du mikrofonojn de la menciita lingvo-laboratoria speco. Tamen, kun iom da bona improvizado, eblas kontentige registri tri aŭ kvar voĉojn.

Jim Deer

Limigitaj konoj

TEJO jam plurajn jarojn intense klopodas starigi bonajn rilatojn kaj kunlaboron kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj, notante en tiuj klopodoj ĉiam pli atentindajn rezultojn. La antaŭ nelonge okazinta Seminario en Kassel (FR Germanujo) estas plia pruvo, ke tia orientiĝo de TEJO estas ĝusta. Tamen, la Seminario en Kassel pravas ankaŭ, ke ne sufiĉas nur havi bonan orientiĝon, sed samtiel necesas multe pli da organizaj preparoj, ol estis farite por tiu ĉi aranĝo. Se oni tion ne komprenos, la malfacile gajnitaj (eĉ se nur partaj) inklino kaj financa subteno de ekstermovadaj instancoj kaj organizaĵoj povus facile malaperi.

EN LA KADRO de la 17a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, okazinta en Zierenberg apud Kassel dum la jarŝanĝaj tagoj, Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO organizis seminarion pri “Estonteco de Eŭropaj Lingvoj kaj Kulturoj”. La Seminario ĝuis subtenon kaj subvencion de Eŭropa Junulara Fonduso. Ĝin partoprenis kvindek da esperantistoj kaj reprezentanto de neesperantista junulara organizaĵo.

Kiel labordokumentoj por la Seminario servis broŝuroj, kiujn eldonis KER por prilumi la ĉeftemon de la Seminario helpe de la profesoroj Jan Knappert, Julius Balbin, Guy Héraud kaj Giorgio Cardona, Unio de Afrikaj Studentoj en Eŭropo kaj Claude Nourmont. Dum la unuaj tri sesioj de la Seminario, ankaŭ Uwe Joachim Moritz, Mauro La Torre kaj Claude Nourmont prezentis siajn prelegojn, kiuj estis bazo de vigla kaj interesa diskuto pri — ne nur teoria skizo de lingvaj kaj kulturaj maljustaĵoj en foraj landoj, sed ankaŭ pri tute konkreta surscenigo de situacioj en la landoj de ĉeestantoj, ĉefe eŭropaj.

Mauro La Torre reprezentanto de COSV (Kunordiga Komitato de Organizaĵoj por Volontula Servo) de Italujo, prezentis ĝian agadon kontraŭ la lingva kaj kultura imperiismo, ĝiajn ĝisnunajn atingojn kaj planon por la sekvanta jaro. Kiel enkondukon al sia prelego, La Torre uzis skriban enketon de la ĉeestantoj pri ilia kono de politiko, literaturo, geografio, lingvoj kaj muziko de Okcidenta Eŭropo, Orienta Eŭropo, Afriko, Azio, Suda Ameriko, Britujo kaj Usono. La enketo estis provoka kaj pruvis al la ĉeestantaro ĝian eŭrocentremon kaj tute supraĵan konon de “foraj” landoj, eĉ kontinentoj. Malgraŭ la fakto, ke pri Okcidenta Eŭropo kaj Usono oni petis detalajn informojn, kaj pri la aliaj regionoj nur bazajn, la rezultoj de la enketo montris, ke multaj el ni daŭre portas restaĵojn de lingva imperiismo.

Esperantistoj, konsekvence de ilia aparteno al la Movado, pruvis pli grandan interesiĝon kaj pli bonan konon de ekstereŭropaj regionoj, sed tamen neproporcion al

la kono de la propra mondo. Pri Pearl S. Buck oni centprocente sciis; pri Sergius Piasecki aŭdis nur kvin procentoj da enketitoj! Ĉiuj sciis antaŭnomon de la edzino de Nixon, sed la unuan Ĉinan kvinjaran planon iuj datumis per la jaro en kiu Ĉina Respubliko eĉ ne ekzistis, kaj la leĝorganon de Sovetunio konis nur 35%. Komparante la rezultojn de la enketo de la esperantista publiko kun tiuj de la neesperantista, precipe elstaras pli bona kono de la unuaj pri la lingva situacio en la mondo; neesperantistoj montris senesperigan neinteresiĝon kaj ignoron pri ĉio ĉi. Kvantam la kuriozaĵoj abundas, sufiĉas menciigi nur unu tian. La demando tekstis: “En Zairo 1–2% de la loĝantaro parolas ankaŭ france. Kiu(j)n lingvo(j)n parolas la ceteraj 98%?”

La rezultoj de la enketo montris, ke 35% de la esperantista enketitaro ĝuste respondis, dum la neesperantista publiko, enketita en Torino, havis nur 2% da ĝustaj respondoj. Unu el ceteraj 98% estis: “Mi ne scias kie estas Zairo, sed se oni tie parolas alian lingvon, ĝi devas esti la angla”.

La du lastaj kunvenoj de la partoprenantoj de KER-Seminario estis dediĉitaj al la difino de estonta agado. Oni plejparte argumentis la metodojn kiel interesiĝi ankaŭ neesperantistojn pri la konsekvencoj de subpremado de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj fare de la grandaj. Tiucele la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO provos provoki publikan debaton pri la temo, inter la fakuloj el diversaj medioj kaj kun malsamaj starpunktoj. Por konkretigi la agadon, oni establos “eltranĉaĵ-servon”: interesitoj el de ili legataj presaĵoj prenos artikoletojn pri lingva situacio, sendus ilin kune kun Esperanta traduko al KER, kiu kompilus bulteneton, multobligus kaj dissendus. Krome, alia granda tasko, kiu atendas la Komisionon, estas organizo de la Seminario “Lingvo kaj Socio”, dum la Internacia Junulara Konferenco, okazonta ĉismomente en Münster, kiam denove estos alparolataj neesperantistaj junularaj organizaĵoj.

Jelena Arandjelović

Grava paŝo en Japanujo

PETICIO pri enkonduko de Esperanto en lernejojn estas oficiale akceptita ĉe la Japana Parlamento. La 25an de septembro 1973, la Komitato pri Edukaj Aferoj de la Ĉambro de Deputitoj aprobis la Peticion favore al Esperanto, prezentitan de 11 deputitoj kun subskribo de centoj da japanaj esperantistoj el diversaj partoj de la lando. La subskriboj estis kolektitaj dum tre mallonga tempo tuj post la 60a Japana Esperanto-Kongreso, en kiu s-ro Goroo Jamanaka — deputito el Japana Socialista Partio — sugestis tion en sia simpozia parolado.

En la oficiala protokolo de tiu Komitato — n-ro 37 por la 71a Sesio de la Ĉambro de Deputitoj — oni legas interalie, ke la Komitato unuanime subtenas la

Peticion kaj transdonas ĝin al la Kabineto por plia konkretigo. Per tio ĉi la projekto pri enkonduko de Esperanto en lernejojn estos pristudata ĉe la Ministerio pri Edukado.

Tio ĉi estas grava nova paŝo en la parlamenta medio, post la iama projekto de Esperanto-instruado en la japanaj lernejoj, kiun ellaboris Japana Socialista Partio en 1967.

Krom tio, oni povas esperi, ke Esperanto estos envicigita kiel unu el la rekomendindaj objektoj por la altlernejaj klubagadoj eksterlernejhoraj, kiuj estas nuntempe devigaj en Japanujo. Pluraj instruistoj jam profitas tiun okazon por fondi Esperanto-klubojn en siaj lernejoj.

Feste en Prilep

PRILEP, kie estas tiu urbo? — tian demandon verŝajne starigas ĉiu nia ordinara leganto. Ĝi situas en Makedonio, la plej suda provinco de Jugoslavio, nombras ĉ. 60 000 loĝantojn kaj estas konata komerca kaj industria centro de tiu regiono; preskaŭ tri mil loĝantoj de Prilep laboras en la loka tabak-industrio. Tamen, por la esperantistaro Prilep estas interesa pro la fakto, ke la tiea loka societo — “La Progreso” — antaŭ nelonge festis sian 45-an datrevenon. La societo havas imponan membro-nombron — 380! — kaj amason da tiuj kiuj simpatias la Internacian Lingvon. En la kadro de la societo funkcias pluraj sekcioj, E-fako de la urba biblioteko nombras pli ol mil volumojn, en la urbo oni gvidas E-kursojn en kelkaj lernejoj kaj krome, kelkaj membroj de la societo pretigas la unuan E-makedonan vortaron, ambaŭdirektan.



Okaze de la Zamenhofa tago — kiel informas nia regu la kunlaboranto Marinko Ĝivoje — Prilep spertis tutan lavangon de rekonoj al la Internacia Lingvo: oni starigis marmoran buston de d-ro Zamenhof (verko de la makedona skulptisto Boris Nikolovski), motelo ĉe la

najbara lago ricevis la nomon “Esperanto”, kaj la oftalmologia kliniko de la urba hospitalo tiun de d-ro Zamenhof. Krome, por anoncita ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, gelernantoj de 9 urbaj elementaj lernejoj sendis preskaŭ 3 500 “verkojn”, el kiuj oni elektis 80 plej sukcesajn por la ekspozicio, kiun, denove okaze de la Zamenhofa tago, malfermis iama sekretario de la unua E-societo en Prilep Dimče Bojanoski, eksministro en la registaro de Makedonio kaj iama prezidanto de Makedonia Esperanto-Ligo.

Lekcio en Iowa

LAŬ OFICIALA INVITO de la organizantoj, prof. d-ro Richard E. Wood (Ŝtata Universitato Louisiana) parolis dum la oka regula sesio de la Instituto pri Mondaferoj de la Ŝtata Universitato Iowa, en la mezokcident-usona urbo Ames (Iowa), en decembro 1973. En la kadro de la ĝenerala temo de la sesio, “Mondo sen Landlimoj”, d-ro Wood parolis pri “La monda lingvoproblemo — ĉu Esperanto estas la solvo?” Lia parolado ĉefe pritraktis la sociologian bazon de la parolantaro de Esperanto kaj la disvolviĝon de la Internacia Lingvo kiel kultura kaj socia fenomeno, kun aparta atento al ĝia progreso ekster Eŭropo. Li krome faris referaĵojn pri Esperanto kaj siaj aliaj esplortemoj — piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, lingvokontakto, lingvoplanado kaj interlingvistiko — antaŭ klasoj kaj kunsidoj de la fakoj pri fremdlingvoj kaj la lingvistika programo de la Universitato. Li estis intervjuita pri la Internacia Lingvo per la radiostacio de la Universitato, kaj la intervjuo, samkiel la teksto de la prelego antaŭ la Instituto, verŝajne estos transdonita al ĉiuj radiostacioj, membroj de la eduka radioreto NPR (Nacia Publika Radio).

La viziton aranĝis Daniel Raasch, juna esperantista aktivulo, studento ĉe la Universitato.

Ha, kia bela pirotekniko!

Recenzas Louis Beaucaire (Berlino):

... *Kun siaspeca spico*, de Raymond Schwartz. La Laguna: Stafeto, 1971. 215p. 22cm.

Estas konate: kiel iluziisto elsorĉas kuniklojn el sia ĉapelo, tiel Raymond Schwartz jonglis per la Internacia Lingvo. Neniu vorto, neniu frazo sentis sin sekura kontraŭ lia ludemo. Hop! seriozmiena vorto malaperas en la ĉapelon, kaj hop! , la prestidigitisto tuj elĉapeligas burleskaĵon. Aplauĉo. El tiuj sennombraj lertaĵoj kelkaj akiris klasikan famecon: oni scias ekzemple, ke, por viro, kiu trovis sian estontan vivkunulon en internacia kongreso. Esperanto fariĝis *edzperanto*.

La unua parto de la jena libro konsistas el poemoj, noveletoj kaj kabaretaĵoj, kolektitaj el diversaj fontoj, precipe el la tro frue malaperinta *Nica Literatura Revuo*. Se ekzegezisto iam komparos la originalajn tekstojn kun la nuna antologio, li konstatos, ke R. Schwartz ofte ŝanĝis kaj plibonigis jen vorton jen frazon, por perfektigi la definitivan formon de tiu Stafeto-libro. Tiaj variantoj montras kiel zorge nia humoristo, ankoraŭ mallonge antaŭ sia elmondiĝo, poluris la lingvon de siaj amdeklaroj al la amuza muko.

La ĉi tie
recenzata libro
estas
la lasta volumo
de Raymond
Schwartz,
aperinta
antaŭ
la pasintjara
forpaso
de la genia
aŭtoro.



En la dua parto de ...*Kun siaspeca spico* ni retrovas la dudek jarajn raportojn, aperintajn en la *Sennacieca Revuo* sub la rubriko "Laŭ mia ... ridpunkto". Mallonga enkonduko de Ulrich Lins memorigas onin pri la ĉefaj eventoj de la koncerna jaro, kaj poste R. Schwartz priskribas al ni, kun la senbrida vervo kaj la neelĉerpebla vortludemo de Montmartra kanzonisto, gravajn tutmondajn politikajn okazaĵojn kaj ankoraŭ pli gravajn eksaktualaĵojn de la esperantista movado. El la mirakla ĉapelo ŝprucas la ŝvarcaĵoj: La ludurbo Monako iĝas *Monsako*, – Pluvo dum feria sezono

estas *libertrempo*. – Jen Elizabeth kun sia *Filipa* (kaj tamen *belbuŝa*) reĝinedzo. Tiamaj kunikloj, ho ve! , eĉ refariĝis hodiaŭaj: pro la petrolkrizo kompatindaj ŝtatestroj devas pilgrimi al Arabujo kaj ludi ĉe ĉiaspecaj Ben'oj inkluzive de *Ben Zino* la rolon de petantoj por sialandaj aŭtomobilistoj; anstataŭ ludi tian ... *petrolon*, ili preferus havi ĝin.

Ha, kia bela pirotekniko! Oni ne legu *parotekniko*, kvankam Schwartz asertis, ke la difino de l'unua validas ankaŭ por la dua: "Arto prepari artfajraĵojn. Scienco pri eksplodaĵoj" (PIV). Plu leginte liajn maldecajn difinojn, ĉerpitajn el PIV (*Pene Ilustrita Vortaro*), kaj raporton pri la Kopenhaga *Sekspozicio*, mi opinias, ke tiuokaze nia neforgesebla satiristo iel funkciis kiel *seksperanto*. Pardonu, Raymond, tiun verdan kunikleton elsaltintan el mia sentaŭga ĉapelo.

Mendu ĉe UEA: 12,— (por Nederlando 12,48) gld. plus sendokostoj 10%.

Valora enhave kaj didaktike

Recenzas d-ro Tazio Carlevaro (Svislando):

Anatomio de la homa korpo, de T. Nakayama. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1973. 52p. 29cm.

Scienca libro pri anatomio en Esperanto estas relative malofta. Jam ekzistas unu tia libro, *Nia Korpo*, de Nishi seiho, sed ĝi havas aliajn celojn: ĝi estas ĝeneral-kleriga, kaj, almenaŭ parte, ne nur morfologie orientita libro. Kontraŭe, la jena havas pli specialistajn celojn. Post enkonduko, kie la aŭtoro prezentas plej ĝenerallajn trajtojn de la homa korpo, la principojn de konstitucio, seksa diferenco kaj aĝa klasifiko, li donas ankaŭ kelkajn informojn, resumajn sed precizajn, de ontogenezo kaj filogenezo. Sekvas ampleksa parto pri la diversaj korpopartoj: skeleta sistemo, muskola sistemo, sistemoj de la spirado, digestado, urinado, generado, cirkulado, interna sekreciado (endokrina sistemo), sentado, la nerva sistemo.

Kiel atendate, ne troveblas faktaj eraroj en la teksto: mi rimarkis, en kampo kie mi iom pli kompetentas, ke la aŭtoro nomas la olfaktajn kaj optajn *trunkojn* "nervoj". Ili ne estas nervoj, sed cerbaj trunkoj, malgraŭ la longjara kutimo nomi ilin "nervoj". La vorto "nervo" estas komforta kutimo de la kuracistoj, nenio plia.

La lingvo de la aŭtoro estas sufiĉe bona. Lingvaj eraroj preskaŭ komplete mankas, kaj ankaŭ la stilo, malgraŭ kelkaj malglataĵoj, estas flue legebla. Cetere, tia libro

havas ja didaktitan celon, kaj ne estas pretendema en la kampo de normiga morfosintakso!

Restas problemo: kio mankas al la libro, kaj, kun la trovitaj mankoj, por kiuj ĝi estas valora aĵo?

Tute prave la aŭtoro sufiĉe strikte limigis sian tekston al anatomiaj (morfologiaj) problemoj. Mankas tamen eĉ simpla aludo al la mikromorfologio, t.e. al citologio kaj histologio. La aŭtoro eksplikas tiun fakton per la konstato, ke dum SUK jam estis prelego tiutema de W. de Smedt, kaj ke li do ne volas duobligi la pri-trakton tiuteman. Sed leganto ne-SUK-iĝinta troviĝas antaŭ problemo. Ja fine: kial la eldonintoj, kiuj sciis pretigi agrablan broŝuron, ne metis ankaŭ la alian prelegon samvolumen?

Alia grava manko estas la foresto de ilustraĵoj. Neniu libro pri anatomio povas permesi al si plenan senbild-econ. Devas esti ĝenerale akurataj bildoj aŭ fotograf-aĵoj, aŭ klarigocele almenaŭ simplaj skemoj kaj skizoj. Certe, la aŭtoro prelegis helpe de ilustra materialo, sed al neĉeestinta leganto la simpla priskribo de la homa anatomio ne sufiĉas, kvankam la aŭtoro kompe-tente kaj trafe faras tion.

Ŝajnas al mi, do, ke tiu libro estas utilega suplemento por tiuj, kiuj ĉeestis la Somerajn Universitatajn Kur-sojn, en formo de universitatnivela multobligita lern-materialo. La broŝuro estas interesa ankaŭ por ĉiu homo, kiu jam konas anatomion, sed volas, ĉu refreŝ-igi siajn konojn (kuracisto), ĉu akiri resuman super-rigardon pri la homa anatomio (zoologo, medicin-studento). Por vere ĝui la libron, ĉi-lastaj devas havi jam bonajn bazkonojn aŭ disponi pri oportuna anato-mi-atlaso kun latina nomenklaturado (ĉar ĝi tre similas al la Esperanta).

Nelaste ankaŭ leksikologo povas ĝui tiun profundan praktikan aplikon de la hom-morfologia terminologio, en kiu la aŭtoro uzas unue la “ĝenerallingvan” Esper-antan terminon, kaj poste, interparenteze, la “tekni-kan” esperantigitan vorton.

Resume: jen verko valora, kun mankoj ŝuldataj al la cirkonstancoj, kaj ne al la aŭtoro aŭ al la eldonantoj, verko kiu meritas seriozan atenton kaj pristudon pro la intereso de la enhavo kaj la didaktike valora struk-turigo.

Mendu ĉe UEA: 15,— (por Nederlando 15,60) gld. plus sendokostoj 10%.

Licencia skizeto

Recenzas Stefan Maul (FR Germanujo):

Ekumenismo kaj internacilingva problemo, de G.J. Korytkowski. Zürchersmühle (Svislando): IKUE, 1973. 176p. 20cm. Dulingva eldono (Esperanto/angla).

Kiel licencia tezo ĉe la universitato Antonianum en Romo, eble ĉi tiu verketo sufiĉas, sed ekumene inte-resitan homon ĝi absolute ne povas kontentigi. Maksi-

mume ĝi estas skizeto pri internaciaj lingvo-projektoj kaj pri kelkaj detaloj (ne pri la gravaj!) en la ekumena Esperanto-movado, sufiĉe torsa.

Interese, ke inter la cititaj kunlaborantoj troviĝas eĉ ne unu ekumena spertulo, sed multaj italoj. Libreto por la itala merkato eble. Sed kial IKUE eldonis ĝin (eĉ dulingve), estas iom enigme. Superflua libro.

Mendu ĉe UEA: 8,70 (por Nederlando 9,05) gld. plus sendokostoj 10%.

Moderne verkita lernolibro

Recenzas John L. Lewine (Usono):

Secondary School Esperanto, Book 2, de R. Markarian kaj J.H. Sullivan. Londono: University Tutorial Press, Ltd., 1971. VIII + 180p. 22cm. Ilustrita.

Secondary School Esperanto II daŭrigas tekston kiun komencis la unua volumo, eldonita en 1968. Ĝi estas bela ekzemplo de moderna lernolibro por studentoj de duagrada lernejo, kiu plaĉos al gelernantoj, al instruistoj kaj al spertuloj pri pedagogio.

La teksto ĉefe temas pri du junaj angloj, kiuj vizitas diversajn landojn en Eŭropo kaj kiuj konatiĝas kun gejunuloj samaĝaj. Lernantojn allogas la belkolora kaj fortika bindaĵo, la bildoj aŭ interesaj fotograf-aĵoj, bonhumoraj desegnaĵoj kaj sugestoj pri individuaj tas-koj. Al instruistoj plaĉos la legaĵoj, bone elektitaj laŭ la enhavo kaj laŭ la temoj kiujn ili klarigas, la vortaroj, kiuj enhavas modernajn esprimojn pri objektoj kaj ideoj, interesaj por gejunuloj, variaj ekzercoj kaj klar-igoj de gramatikaj elementoj, plej ofte malfacile kom-preneblaj por anglalingvanoj. Al pedagogoj kaj lingvi-stoj plaĉos la aplikado de modernaj metodoj en la lingvo-instruado; la edukaj instancoj notos, ke la aŭtoroj funde konas la instrumentojn, preferatajn en la nuntempa edukado. La aŭtoroj tre bone kom-prenas, ke la instruado de Esperanto ne estas limigita al fenomenoj lingvistikaj. La naturo de la Internacia Lingvo donas al la studo de Esperanto dimension pli larĝan. La aŭtoroj emfazas kulturajn valorojn, histori-ajn kaj geografiajn, kaj la specialajn valorojn de la internacia kulturo, kiun respegulas Esperanto.

Fine, la libro enhavas poemojn, kantojn kaj teatraĵojn, kiuj interesos la gelernantojn kaj ebligas al ili buŝe praktiki la lingvon. Ĝi ankaŭ enhavas Aldonon kun utilaj informoj, kiuj faciligos pluan lernadon kaj insti-gos al partopreno en la Movado.

Sonbendoj kaj filmo, haveblaj de British Esperanto Association, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, multe helpas la uzantojn de tiu ĉi tre rekomen-dinda verko.

Mendu ĉe UEA: 11,50 (por Nederlando 11,96) gld. plus sendokostoj 10%.

Majstra satiro en tolerebla vesto

Recenzas Petar Stefanović (Jugoslavio):

Melo antaŭ tribunalo, de Petar Kočić. Trad. N. Korasić. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1973. 32p. 17cm.

La verkoj de Kočić (1877-1916), farantaj gravan etapon en la evoluo de la realisma prozo serba, dividiĝas en du temciklojn. En siaj noveloj la aŭtoro malkovras la psikon de la bosnia kamparano, lian noblan moralan figuron, lian firmecon en la lukto kontraŭ la destino. La novelarto de Kočić distingiĝas per kuniĝo de lirikismo kaj drameco, tragikeco de la situacioj, freŝa kaj kolorriĉa lingvaĵo, impresionisma delikateco en la pentrado de la naturo.

La unuakta komedio *Melo antaŭ tribunalo* (1904) apartenas al la ciklo de la satiroj kontraŭ la aŭstra-hungara administracio en la okupita Bosnio-Hercegovino. La ruza kamparano David Štrbac, ĉefheroo de la komedieto, alportas en la juĝejon melon, kiu dezertigis lian maizkampon, kaj postulas justecon. En ŝajne nai-vaj rezonadoj Štrbac eldiras, kun gaja humoro, akra ironio kaj kuraĝo, la tutan veron pri ĉiuj institucioj de la Habsburga monarkio: impostoj kaj bienmastroj, burokratoj kaj ĝendarmoj, popoloj kaj uzuristoj.

Kvankam la satiro trovis siatempe grandegan resonon kaj akiris esceptan popularecon dank'al sia popola starpunkto, la literatura talento de Kočić estus pli bone reprezentita al la internacia publiko per la novelkolekto *Desur la montaro kaj elsub la montaro*, troviĝanta sur la "Provizora listo de reprezentaj verkoj de la universala literaturo" de Unesko, rekomenditaj por tradukado, kun 25 aliaj verkoj el la jugoslavaj literaturoj.

Malgraŭ pluraj feliĉaj solvoj, la traduko ne estas sufiĉe internacia. (Ĝi estis kontrolita de Roger Imbert.) La antaŭparolo de Zlatko Tišljar estas konciza kaj instruoplena. La kovrilpaĝon plaĉe desegnis Nikola Matijević. Bedaŭrinde, sur la 32 paĝoj la preseraroj svarmas.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld. plus sendokostoj.

Utila sperto

Recenzas Dermot J.F. Quirke (Britujo):

Viktimoj; Sur sanga tero, de Julio Baghy. Kopenhago: Eldonejo TK, 1971. 504p. 18cm. Tolbindita. ISBN 87 87089 06 8.

La postmilita generacio de esperantistoj troviĝas en kultura etoso tute fremda al la antaŭmilita. Konsentite, ke ni sorbis la saman literaturan tradicion, sed ne

senpere: relative malofte ni efektive tralegas furorverkojn de la korifeoj de la intermilitaj jaroj, kvankam ilian efikon pludonas al ni la modernaj verkoj de aŭtoroj trempitaj en la tradicio de antaŭ la milita breĉo. Tial por mi estis utila sperto, ke mi devis recenze legi ĉi tiujn romanojn de Julio Baghy, nun forte represitajn de Torben Kehlet.

Mi trovas la stilon interesa kaj vigla: ĝi ne donas tiel eksmodan impreson, kiel oni renkontas foje ĉe samepokajoj. Speciale la konversacioj trafas min realece kaj nature. Aliflanke, la karakterbildoj ne estas konvinkaj: la roluloj en ambaŭ romanoj estas iom ŝablonaj kaj pupecaj. Ilin, kaj la intrigon, Baghy pentras nur per nigro kaj blanko: mankas la grizoj de la vivo. Bedaŭrinde, ke li sentas bezonon kvazaŭ prediki per siaj verkoj (ne nur diskrete, per la ĝenerala tendenco de la verkado, sed tro trude kaj eksplicite). Mallonge, mi trovis la stilon instrua kaj la moralan tonon predike edifa, sed la romanojn en si mem ne tre legindaj. Tamen, por postmilitano la sperto utilas.

Sed ne je tia absurda prezo! Por simpla fotorepreso ĝi estas ŝoke troa. La verkoj de Baghy estas ankoraŭ akireblaj brokante, kaj multaj bibliotekoj disponigas ilin. Mi konsilas al eventualaj legemuloj, ke ili serĉu la malnovajn eldonojn, kaj tiel ŝparu al si grandan monsumon, uzeblan por aĉeti pli modestprezajn eldonaĵojn.

Mendu ĉe UEA: 27,00 gld. (por Nederlando 28,08 gld.) + sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Ekumenismo kaj internacilingva problemo (1973) Georgo J. Korytkowski. 174p. 20cm. Broŝ. 8,70 gld. Historia kaj aktuala superrigardo al la laboro de esperantistoj por la ekumena movado. Kun iom koncizigita angla traduko.

Esperanto en lingvolaboratorio (1973) H. Behrmann. 75p. 21cm. Broŝ. 5,40 gld. Tekstoj de 69 magnetofonaj bendoj por laboratoria kurso.

Junulejo (1882) M. Cané (1851-1905); **La buĉejo** E. Echevarría (1805-1851). Tradukis Ergoto de Bonaero. 127p. 17cm. Broŝ. 9,54cm. Argentinaj romano kaj novelo.

Komputilteknika vortaro Hungara-germana-angla-rusa-esperanta (1972) 464p. 19cm. Plaste bind. 19,20 gld.

Liptov, kolora turisma prospekto kun aparte presita E-teksto. Liptovský Mikuláš: Okresný národný výbor, 1973. 12+6p. 21cm. Senpaga.

Renkonto kun Trentino G. Scrinzi. Elitaligis Carolina kaj Luigi Minnaja (1973). 117p. Kolorilustrita, mapoj. 18x18cm. Bind. 7,50 gld. Aparte bele prezentita bildlibro, ankaŭ kiel gvidlibro utila.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.



59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 — 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

14-a Infankongreseto atendas siajn junajn gastojn

Kontraŭe al pli frua informo, en la 14a Internacia Infana Kongreseto, okazonta samtempe kun la Universala Kongreso en Hamburgo, estos loko por maksimume 46 infanoj. Pro tio estas konsilinde anonci la aliĝojn kiel eble plej frue. Aliĝilo estas jam pretaj kaj riceveblaj ĉu de la Centra Oficejo en Rotterdam, ĉu de la LKK en Hamburgo. La kongresetejo estas tre taŭga domo proksime de Hamburgo: Schullandheim Gut Hoisbüttel, kaj la infanojn prizorgos minimume kvin profesiaj edukistinoj kaj pedagogie spertaj komisiitinoj. Rajtas partopreni infanoj de 6- ĝis 13-jaraj, kiuj havas sufiĉan lingvoscion. La kotizo, kiu inkluzivas la loĝadon, manĝojn, programon, prizorgon kaj asekuron, estas por unuopa infano 100.- germanaj markoj. Plia frat(in)o, kiu samtempe ĉeestas, pagas kotizon de 75.- germanaj markoj.

Blindula Kongreso denove samtempe kun UK

Samtempe kun la Universala Kongreso kaj en ĝia kadro okazos la 42a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Ĝis la 28a de januaro 1974 aliĝis al ĝi jam 110 personoj el 15 landoj. Restas nur malmultaj



Multaj estas la taskoj kaj problemoj de loka kongresa komitato — kaj sekve multnombraj kaj longaj estas ankaŭ ĝiaj laborkunsidoj. Jen parto de la LKK Hamburga, dum januara kunsido.

litoj disponeblaj por pliaj aliĝontoj, kaj la organizantoj rekomendas fruan sinanoncon, ĉar la restantaj lokoj estos asignitaj laŭ la sinsekvo de la aliĝoj. Oni turnu sin al la afergvidanto de la blindulkongreso: S-ro Karl-Heinz Hoffmann, Genseneck 14, D-2000 Hamburg 54; tel. (040) 54 39 49.

Fervojgiĉeto por la kongresanoj

En la kongresejo en Hamburgo estos instalita oficiala giĉeto de la ŝtata fervojo *Deutsche Bundesbahn*. Ĝiaj Esperante-parolantaj deĵorantoj donos al la kongresanaro ĉiujn servojn, kiuj rilatas al la fervojo, ekzemple pri mendoj de sidlokoj, mendoj de dormvagono ktp.

Solida financa garantio

LKK kun granda kontento anoncas, ke la Garantia Kapitalo (por kovri eventualan deficiton) jam superis la fiksitajn sumojn de 5 000,— gld. Germanaj esperantistoj inter si kolektis en nur kelkaj monatoj sumon de pli ol 7 000,— germanaj markoj. LKK deziras publike danki per ĉi tiu sciigo ĉiujn kontribuintojn.

"Tra pitoreska Nederlando"

Aŭtobusa ekskurso, kiu komenciĝos la 14an de julio en Rotterdam, kaj finiĝos la 25an de julio 1974 en Hamburgo. Vidu flugfolion en la novembra numero de tiu ĉi revuo. La prezo, kiu inkluzivas altnivelajn hotelojn, ĉiujn manĝojn kaj aliajn kostojn, estas 885.- guldenoj.


Pli ol sufiĉe da benzino por la aŭtobuso! Limdato por aliĝo ŝovita al la 15a de marto, por komplezi al tiuj, kiuj hezitis pro necertaj cirkonstancoj. Petu detalajn informojn kaj aliĝilon ĉe la organizanto: F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, II, Rotterdam.

Konversaciaj rondoj por komencantoj

Estas proponite organizi en la kadro de la Universala Kongreso "konversaciajn rondojn por komencantoj" sub la gvido de spertaj parolantoj. Interesitoj partopreni, ĉu komencantoj, ĉu personoj kapablaj gvidi tiajn rondojn, bonvolu sin anonci poŝtkarte al la adreso de la Loka Kongresa Komitato, por ke ĝi povu rezervi en la programo la bezonatan tempon kaj spacon.

Grava atentigo pri loĝigo

La kongresanoj estas varme petataj ne skribi jam nun al la adresoj de la Kongreso, nek al la urba turisma oficejo de Hamburgo, pri mendo de hoteloj. Tiaj petoj nur sennecese laborigas la organizantojn. Ĉiu aliĝinto ricevos fine de februaro aŭ komence de marto, kune kun la Oficiala (Dua) Bulteno, hotelmendilon. Ĉiu, kiu mendos tiumaniere, ricevos post nelonge la konfirmilon pri la menditaj litoj.



LA 30-A INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO
1974 08 03 – 08 10, Münster (FR Germanujo)

Denove pri Münster

La 30a IJK, pri kiu ni skribis ankaŭ en la januara numero de la revuo, jam konkretigas sian programon. La ĉeftemo de la Konferenco – Junularo kaj Edukado – estos traktata tiel, ke ĝi inkluzivu diversajn trajtojn de la ĝeneralaj eduka kaj junulara politikoj. Laŭ provizora programo, kiun intertempe pretigis la loka organiza komitato, en Münster oni traktos: internaciajn junularajn interŝanĝojn, reformon de la altlernejoj, kontraŭ-aŭtoritatan edukadon, lingvo-instruadon kaj, kompreneble, ankaŭ la laboron de TEJO. Estas interese, ke laŭ unu el la lastaj gazetaraj komunikoj de la organizantoj, en Münster prelegos ankaŭ Karl-Heinz Walkhoff, membro de la germana federacia parlamento, kaj d-ro Helmar Frank, profesoro pri cibernetika pedagogio en la Altlernejo Paderborn kaj aŭtoro de la konataj “tezoj pri germana lingvo-politiko”.


En la kadro de la 30a IJK, la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO intencas aranĝi apartan seminarion pri la temo “Lingvo kaj Socio”. Tiu ĉi aranĝo celas ĉefe neesperantistajn junularajn organizaĵojn kun kiuj TEJO kunlaboras kaj kies partoprenon oni atendas en Münster. KER ankaŭ por tiu ĉi seminario esperas ricevi financon subtenon de Eŭropa Junulara Fonduso.

La organizantoj de la Konferenco ne kaŝas sian kontenton rilate la bonan alfluon de la aliĝoj. Temas jam pri kvindek da gejunuloj el 16 landoj, kio por IJK estas alta nombro en tiu ĉi parto de la jaro. Atentinde estas, ke al la adreso de IJK venis anonco pri partopreno de oficiala delegacio de la esperantista junularo el Sovet-Unio, kio signifus unuafojan reprezentigon de tiu lando en iu TEJO-aranĝo, okazanta en la Okcidenta Eŭropo, afero nepre ĝojiga kaj esperdona.

Sed, troŝtopi programon de junulara aranĝo sole per labor-kunvenoj estus grava peko. Tial oni al Münster invitis ankaŭ la konatan “Kvarteto Esperanto” el Ĉeĥoslovakujo, kiu ankaŭ pasintjare amuzis ne nur la partoprenintojn de la sarajeva IJK, sed ankaŭ tiujn de la 58a UK en Beograd. En la kadro de la 30a IJK oni planas tri dancvesperojn, tuttagan ekskurson al la regiono norde de la konferenca urbo kaj “ŝicen-feston”, kiel la organizantoj neologismas tradician popolfeston, kies karakterizaĵo estas pafado al ligna birdo, per kio oni planis fini la ekskursan tagon. Se la disponeblaj

financaj rimedoj tion permesos, okazos ankaŭ teatra kaj pupateatra prezentoj.

La esperoj loĝi en tute nova studenta domo, nun konstruata en la centro de la urbo, montriĝis vanaj, ĉar la konstruaĵo estos preta nur du monatojn post la Konferenco. Tamen, la partoprenantoj loĝos en kelkaj aliaj studentaj domoj, situantaj en la sama kvartalo kaj ne malpli komfortaj, kvankam ne tute novaj. Ĉiujn pliajn detalojn pri la aranĝo petu de: **La 30a Internacia Junulara Konferenco, p/a Gisela Jungkamp, Mondstr. 3, D-4400 Münster, FR Germanujo.**



Münster —
la gotika
urbodomo,
rekonstruita
post la lasta
milito.
En ĝi troviĝas
la fama
“Pacsalono”
en kiu oni
proklamis
la “Vestfalian
pacon”
post
la Tridekjara
milito.

JEFO invitas al Grésillon

Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) organizas denove ĉi-jare Paskan Kulturelan Semajnon en Grésillon, Baugé (Maine-et-Loire). Jen la datoj de PKS'74: de la 23a ĝis la 29a de marto 1974. La temo de la renkontiĝo estas “Junularo kaj Esperanto”, kiun oni studos en forumoj, prelegoj, diskutrondoj ktp. La distran parton oni ne forgesos kaj la distraj vesperoj promesas multe da ĝoja etoso. Okazos ankaŭ interesa ekskurso. Fine, venu amase por ĝui la ampleksan programon kiun JEFO preparis por vi en la bela kastelo Grésillon!

Por pliaj informoj skribu al: JEFO, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francujo.

Briko post briko . . .

LA JARO 1973 denove estis rekorda. UEA enspezis entute 3 367,48 guldenojn el la vendado de uzitaj poŝtmarkoj, kiujn donace sendis la membraro. Ĉiam kreskas la nombro de unuopaj membroj, kiuj en siaj regulaj korespondaĵoj kun la Centra Oficejo ne forgesas meti en la koverton kelke da markoj. Sed troviĝas ankaŭ kelkaj membroj, kluboj kaj aliaj organizaĵoj, kiuj jam de jaroj kontribuas grandajn kvantojn da poŝtmarkoj, kiujn ili diligente kolektas inter siaj amikoj kaj konatoj.

Speciale al ili, sed ankaŭ al ĉiuj, kiuj reagis al niaj alvokoj, ni direktas varman dankon. Modestajn libro-premiojn ĉi-jare ricevas: S-ino Jeanne Oehri (Francujo), s-ino Ernest H. Franseen (Usono), s-ro A. Garcia Breque (Argentino), la nov-zelandaj esperantistoj pere de s-ino M. Frizzel, f-ino Marthe Reynand (Francujo),

s-ro G. Schmidt (FR Germanujo), la movado Oomoto (Japanujo), s-ino L. Dovat (Svislando), s-ro Ota Ginz (Israelo) kaj s-ino Rosa Buscato (Hispanujo). Se oni konsideras, ke nur unu kvarono de la individuaj membroj de UEA estas virinoj, necesas aplaŭdi la eksterproportcian aktivecon de la sinjorinoj sur ĉi tiu kampo! Dankon meritas ankaŭ filatelistaj membroj, kiuj aĉetis siajn poŝtmarkojn ĉe UEA, ofte pagante gravajn sumojn por aparte valoraj specimenoj. Fine, la tuta agado estus malebla, se ne troviĝus iu, kiu senpage farus la grandegan laboron kolekti, ordigi, klasifiki kaj disvendi; tiu iu estas s-ro Peter Zacho en Kopenhago, al kiu ĉefe ŝuldiĝas la ĉiam pli bonaj financaj rezultoj. Ankaŭ dum 1974, prefere sendu viajn poŝtmarkojn rekte al s-ro Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Kalendaro

Kio? Kie? Kiam?

Februaro

- 01-07 Vintra E-Semajno, Pamporovo, Bulgarujo
- 09-16 15a Internacia E-Skisemajno, Maribor, Jugos.
- 18-24 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

- 02-09 Vintra E-Feriado, Monto Sitno, Ĉeĥoslov.
- 10 Plurlanda E-Renkontiĝo, Méricourt, Franc.
- 23-29 13a Kultura Semajno, Grésillon, Francujo
- 23-02/4 Seminario pri Superaj Studoj, Grésillon, Fra.
- 30-02/4 Franca Kongreso de Esperanto, Saint Etienne
- 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

- 12-15 58a Brita Kongreso de Esperanto, Sheffield
- 13-15 Beneluksa E-Kongreso, Liège, Belgujo
- 14 Zamenhof mortis en 1917
- 27 Limdato por la Internacia Ekzameno

Majo

- 04-05 Hispana-Franca Renkontiĝo en Bayonne, Fra.
- 11-12 6a Kultura E-Semajnfino, Renens, Svislando
- 11-17 26a IFEF-Kongreso, Tarragona, Hispanujo

Junio

- 01-03 68a Sveda E-Kongreso, Borlänge, Svedujo
- 20 Limdato por aliĝo al la Universala Kongreso
- 21-23 25a Hungara E-Kongreso, Szolnok
- 24-27 Hungara Postkongreso, Szolnok

Julio

- 01-21 Kulturaj Esperantistaj Semajnoj, Grésillon, F.

- 06-07 Fervojista E-Renkontiĝo, Szombathely, Hungarujo
- 07-13 12a Somera E-Universitato, Gyula, Hungar.
- 07-14 Internacia E-Tendaro, Vääsky, Finnlando
- 10-20 7a Pionira Internacia Tendumado, Sikonda, Hungarujo
- 15-24 7a Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj, Abaliget, Hungarujo
- 16-20 Seminario "Balta Maro - Maro de Paco", Gdańsk, Pollando
- 18-22 36a Hispana E-Kongreso, Valladolid
- 21-27 Internaciaj FERIAJ Kursoj, Helsingør, Danl.
- 22-11/8 Internaciaj Semajnoj, Grésillon, Francujo
- 26 Publikigo de la Unua Libro de Esperanto, 1887
- 27-03/8 59a Universala Kongreso, Hamburg, FRG

Aŭgusto

- 03-09 47a Kongreso de SAT, Bergamo, Italujo
- 03-10 30a Internacia Junulara Konferenco, Münster, FR Germanujo
- 04-11 Oficiala Postkongreso, Kronach, FR Germ.
- 04-14 Internacia Turista Renkontiĝo, Szeged, Hung.
- 04-25 Someraj Universitataj Kursoj, Dua Sesio, Liège, Belgujo
- 10-17 Somera E-Kurso, Barlaston, Britujo
- 12-02/9 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
- 19-24 Varia Internacia Semajno, Budapeŝt, Hung.

Septembro

- 14-25 Ora E-Feriado, Pamporovo, Bulgarujo
- 18-28 Ĉebalta Kultura Seminario, Kadyny, Pollan.
- 21-22 7a Kultura E-Semajnfino, Renens, Svislando
- 22-28 15a Eŭropa Feriosemajno, Magliaso, Svislan.

Aŭstrujo

- La 17an de januaro 1974 la aŭstra televido elsendis programon pri la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj. La elsendo okazis en la kadro de la regula rubriko "Kulturo Aktuala".

Brazilo

- Kultura Kooperativo de Esperantistoj, la antaŭ nelonge al UEA aliĝinta nova landa asocio, entreprenas grandan varbkampanjon, en kies kadro oni formas ankaŭ klubojn de amikoj de Esperanto. Kontraŭ malalta jara kotizo la membroj de tiuj kluboj regule ricevas portugallingvajn informojn pri la Movado, kiujn oni distribuas ankaŭ al 500 redakcioj de la brazila gazetaro.

Ĉeĥoslovakujo

- Esperantista klubo en Prago organizas novajn Esperanto-kursojn kaj spertas grandan interesiĝon pri la kurso por komencantoj. Tiun kurson gvidas la vicdelegito de UEA Antonín Slanina, laŭ nova metodo "Inter". Apartan interesiĝon pri la kurso montras gejunuloj.

Hispanujo

- Boletin, oficiala organo de Hispana Esperanto-Federacio, fine de la jaro 1973 festis duoblan jubileon — 25 jarojn de ekzisto kaj la aperon de sia 200-a numero. Apartan atenton koncerne la enhavon de tiu jubilea numero kaptas la teksto de la prelego, "Lingva ĥaoso: bremsa por la progreso", kiun s-ro Darío Rodríguez faris dum la 33a Hispana kongreso de Esperanto, okazinta fine de julio 1973 en Madrido.

Jugoslavio

- Centro por plastik-arta edukado de infanoj kaj junularo en Novi Sad (Jugoslavio) organizos ĉi-somere tri internaciajn ekspoziciojn de infanaj kaj gejunulaj kreaĵoj sur la kampo de plastikaj artoj. Ĉiuj tri ekspozicioj okazos en aŭgusto ĉi-jare. Detalojn pri partopreno oni povas peti de la Centro (M. Gorkog 54, YU-21000 Novi Sad) ankaŭ en la Internacia Lingvo, uzata por reklami la aranĝojn.

Pollando

- Okaze de la Jaro de Pola Scienco (1973), Pola Poŝto eldonis fine de la jaro serion de 7 poŝtkartoj sub la nomo "Polaj sciencistoj, pedagogoj kaj inventistoj". Unu el la kartoj (presitaj en po 300 000 ekz.) estas dediĉita al la fama pola esperantisto prof. Z. Klemensiewicz (1891-1969), iama honora membro de PEA.

Fake

Universitatoj

- La grava usona universitato Wesleyan University, en la urbo Middletown, ŝtato Connecticut (nordorienta Usono) enkondukis plene oficialan kurson de Esperanto. La instruisto estas d-ro Norman Shapiro, katedra profesoro pri latinida filologio, nacie konata fakulo. La enkonduko kaj la prepariĝo de prof. Shapiro por ĝin gvidi estas rekta sekvo de studenta postulo pri Esperanto-kurso.

Gvidantoj

- La Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio organizis la 16an de decembro 1973 en Sofio unutagan kurson, kiun ĉeestis 53 prezidantoj kaj sekretarioj de esperanti-

staj distriktaj komitatoj en la lando. La celo de la kurso estis plialtigo de organizaj konoj de la gvidantoj. Oni tie traktis jenajn aspektojn de la organiza laboro: la aktualaj stato kaj taskoj de la E-movado, la Statuto de BEA kaj ĝia apliko, kiel organizi kunsidon kaj kontroli la plenumon de ĝiaj decidoj, laborplanado, agado en la junularaj medioj. La sekvintan tagon okazis en Sofio plenkunsido de BEA, kiu interalie akceptis rezolucion pri la estonta agado de la Asocio.

Informado

- Portugallingvan eldonon de la konata seslingva faldfolio de UEA *La Internacia Lingvo Esperanto* ĵus efektivigis (10 000 ekz.) Kultura Kooperativo de Esperantistoj, la nove aliĝinta landa asocio de UEA en Brazilo. Samtempe aperis — ankaŭ ĝi kun la sama konata frontpaĝo kiel la seslingva — la dua nederlandlingva eldono, preparita de LEEN en kunlaboro kun UEA.

Varbado

- Juna hamburgano Harald Schicke, kiu ekzameniĝis ankaŭ pri Esperanto dum sia abiturienta ekzameno, komisie de la germana ILEI-sekcio, varbis en la universitatoj kaj altlernejoj de sia lando (Bremen, Frankfurt, Mainz, Münster, Darmstadt, Dortmund, Köln). Unu el la rezultoj de la varbkampanjo estis pluraj favoraj artikoloj pri Esperanto en la loka gazetaro.

Persone

Boulton

- Komence de decembro 1973, la konata E-verkistino Marjorie Boulton gastis ĉe la Novjorka E-societo kaj dum ties festo, okaze de Zamenhof-tago, inspire parolis pri "Kion Zamenhof farus nun?" La aŭtorino de la plej renoma biografio de Zamenhof vizitis ankaŭ aliajn usonajn urbojn kaj tieajn E-societojn: Pittsfield (Mass.), Washington (D.C.) kaj Philadelphia (Pa.).

Harry

- Ambasadoro Ralph Harry, kiu fine de la jaro 1973 troviĝis en Novjorko por tie ĉe UN reprezenti Aŭstralion en la traktadoj de la nova inter-

nacia leĝaro pri maroj, ĉeestis la 7an de decembro 1973 festvesperon en la Novjorka Esperanto-Societo kaj parolis pri la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

Wüster

- Prof. d-ro Eugen Wüster, honora membro de UEA, ricevis lastatempe ankoraŭ du gravajn honorigojn. *Institute of Linguistics* (Londono) aljuĝis al li unu el kvar specialaj medaloj okaze de sia 60-jara ekzisto. Ankaŭ *Bundesverband der Dolmetscher und Übersetzer* (Asocio de interpretistoj kaj tradukistoj, FR Germanujo) decidis prezenti al prof. Wüster sian oran insignon.

N-ro 475, 1974 - 01 - 28

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

FIN: S-ino T. Tyynelä. KAN: F.G. Hanson. NED: S-ino M.A.v.d. Kooij-Waal, S-ino G.J. Rodenhuis-Boll. NOV-ZELANDO: S. MacGill.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1974

BEL: S-ino Van Ginderen-Martens, J. Verstraeten. FIN: A. Backholm, N.G. Narvala, Aarne Ratalahti, E. Syrjänen.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974-03-31 neniun membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

AŬSTRALIO: E. Wreford Chandler, FD Sydney. BRA: A. Plauda da Silva, D Criciuma; F.A. Lopes de Sousa, FD Fortaleza; Braz Cosenza, D; S. Malheiros, FD Rio de Janeiro. FIN: M. Telaranta, FD Taipalsaari; T. Grundström, JD Turku. FRA: E. Laugier, D Carpentras. FRG: J. Kondor, D Neuweid; f-ino I. Maier, D Tailfingen; s-ino R. Beug, FD Würzburg. GREKUJO: A. Argiropoulos, D Glifada. HUN: I. Bujdosó kaj A. Mathé FD-oj Budapest; F. Pásztor, D kaj FD Szolnok. IRAN: B. Samimy, VD Teheran. JUG: D. Vahen-Svetinov, D kaj FD Kapele; S. Štiglic, D, FD Kranj. NED: E. HaverSchmidt, FD Den Haag. NOR: S-ino Margrete Landmark, FD Oslo; B. Mydland, D Skien; R.H. Holm, D, H. Olsen,

VD; Arne Høgseth, FD Tromsø. NOV-ZEL: Michael C. Leon, VD Lower Hutt. SVEDUJO: I. Nilsson, D Umeå. USONO: S-ino A.S. Casey, FD La Jolla; J.J.P. Stitz, D Redlands; s-ino Joyce J. Shipman, VD San Antonio. VENEZUELO: J. E. Bachrich, D Caracas; Carlos Levay, FD Valencia.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri jenaj delegitoj en Jarlibro 1973, Unua Parto.

BRI: Brighton; Dunfermline; Glasgow, D kaj FD (turismo). ĈEĤOSL: Hodonín. DAN: Jyderup; Silkeborg, D kaj FD (SOS-aŭtoservo); Spjellerup; Vejle, D. FIN: Rauma; Rovaniemi; Vaasa. FRA: Hyères, FD (filozofio); Nevers, D; Parizo, FD (geografio) kaj FD (teatro amatora); Toulouse, D; Vire, D. FRG: Augsburg, D kaj FD (turismo); Gronau; Nothfelden; Truchtelingen; Weiden; Wolfenbüttel. HISPANUJO: Flassá. ITA: Fossano, FD. JUG: Beograd, VD. NEDER: Drachten; Waubach;

Zwolle. NORV: Lillestrøm; Tromsø D kaj VD. NOV-ZEL: Auckland, FD (folkloro) kaj FD (paco); Palmerston North. SVE: Hällefors; Malmö, FD (kooperativismo); Umeå D, kaj VD.

DONACOJ 1973 (Gld.)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Anonime: 7,70. Nederlando: R. Moerbeek 50,—. Sumo ĝisnuna 293,20.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: F-ino S. Koivu 41,62. Nederlando: R. Moerbeek 25,—. Svedujo: S-ino K. Walden 74,45. Sumo ĝisnuna 3427,90.

ĜENERALA KASO; Anonime: 1,—. FR Germanujo: M. Murath 12,42. Nederlando: F.H. Kat 45,—; R. Moerbeek 25,—. Sumo ĝisnuna 1462,25.

PATRONAJ MEMBROJ A DE TEJO 1974: 7. J. Vilkki, 8. A.K. Minelli, 9. D-ino L. Oterma. Finnlando. 10. P. Almén, 11. R. Nordström, Svedujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. UEA.

ELEKTO DE KOMITATANOJ B:

Dek kvar kandidatoj por ses lokoj

ALDONE AL LA ANONCO pri la elekto de komitatanoj "B" de UEA por la venonta oficperiodo (1974 — 1977) en la novembra numero de *Esperanto* (p. 199) ni informas, ke la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31a de decembro 1973 estis 1 294. El la artikolo 28 (a) de la Ĝenerala Regularo sekvas, ke la nombro de komitatanoj "B" elekteblaj estas SES.

Ĝis la anoncita limdato — la 1-a de februaro 1974 — alvenis validaj proponoj por entute 14 kandidatoj. Jen la alfabeto listo de la kandidatoj, kun parenteze indikita nombro de proponintoj: Senad Čolić, Jugoslavio (7), Pál Felső, Hungarujo (8), Genço Genčev, Bulgarujo (5), Karl Greutert, Svislando (5), Ivo Lapenna, Britujo (32), Franko Luin, Svedujo (11), Uwe Joachim Moritz, FR Germanujo (7), Paul Peeraerts, Belgujo (5), Andrzej Pettyn, Pollando (7), Juan Régulo Pérez, Hispanujo (5), Karl Söderberg, Svedujo (9), Jean Thierry, Francujo (6), Renée Triolle, Francujo (6), Marianne Vermaas, Nederlando (6). Voĉdonilo pri la kandidatoj estos rekte sendita al ĉiuj ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne al vicdelegitoj aŭ fakdelegitoj). Post la paso de la limdato por la voĉdono, en ĉi tiu revuo aperos anonco pri nove elektitaj komitatanoj "B".

Radio Zagreb vendrede

RADIO ZAGREB informas, ke ĝiaj elsendoj por esperantistoj ekde la 8a de marto 1974 okazos VENDREDE (ne plu ĵaŭde) je la 23.05 laŭ la Greniĉa tempo, resp. je la 00.05 laŭ MET. Ondolongo restas la sama: 264m.



Nekrologoj

TOMÁŠ BALDA (1908-1973)

La 8an de decembro 1973, en Prago forpasis Tomáš Balda, honora membro kaj estrarano de ĈEA, laŭreato de ĉeĥoslovaka pacpremio, kiu multe aktivis en MEM, kies ĝenerala sekretario li estis. ĈEA presigis apartan anoncon en Esperanto pri lia forpaso.

LILA WILTSHIRE (1898-1973)

En Auckland, Nov-Zelando, la 9an de oktobro 1973, forpasis Lila Wilt-

shire, fakdelegito kaj malnova membro de UEA. S-ino Wiltshire, edzino de la vicĉefdelegito de nia Asocio en Nov-Zelando, estis tre aktiva membro de la Movado en sia lando.

COURT ALDSTEN (1908-1973)

En Karlskrona, Svedujo, la 7an de oktobro 1973, forpasis la tiea multjara delegito de UEA Court Aldsten, kiu dum pli ol 20 jaroj prezidis la lokan Esperanto-klubon kaj apartenis al la plej energiaj E-aktivuloj en sia regiono.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Se vi havas vendeblajn ekz. de Esp. revuoj kaj libroj, bv. skribi al s-ro Ramon Molera – str. Sta. Joaquina, 13 – Moyá (Barcelona) – Hispanujo.

F-ino Claude de Coudenhove, 104, faubourg Madeleine, F-45000 Orléans, Francujo, 43-jara laboratoria helpantino, deziras korespondi kun homoj el Azio kaj Afriko. Respondo certa.

Eldonejo Distrokasetoj petas proponojn de artistoj tutmonde kunlabori en la eldono de serio de magnetofonkasetoj. Petu detalojn p/a Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Letervesperon la 22an de aprilo organizas Esperanto-fako en junulara domo. Bildkarto, salutvortoj bonvenaj. Adreso: Section Esperanto, Maison des Jeunes, F-33150 Cenon Palmer, Francujo. Dankon!

Deziras korespondi kun Francujo, Italujo kaj Hispanujo: s-ino Fink, 88, Headingley, 3149, Victoria, Aŭstralio.

Geanoj de nova rondeto deziras korespondi kun la tuta mondo, pri ĉiuj temoj. Afranku filatele. Esperanto-

rondo, Foyer d'Education permanente, F-16800 Soyaux, Francujo.

"Plena gramatiko": enhavtabelo. Por mia propra uzo mi realigis alfabetan enhavtabelon. Mi povas disponigi ĝin al kiu ajn, kontraŭ respondkuponon kaj koverto: Lentaigine, 3, avenue Gaillarde, F-34000 Montpellier, Francujo.

La grupo ESSONNE ESPERANTO, 2, rue Joliot-Curie, F-91700 Sainte Geneviève des Bois, aranĝas letervesperon la 1-an de marto 1974, kaj atendas precipe bildkartojn kaj komerc- kaj turism-faldfoliojn. Respondo al ĉiuj.

Eldono de speciala memorkarto kun unuataga stampo kaj poŝtmarko "Tago de la Poŝtmarko 1974" (kvanto limigita), okaze de la Esperanto-kongreso de la Pariza Regiono. Prezo 5 fr.fr. Mendoj kun pago al F.P.E. (CCP. Paris 10482.04), 4-bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, antaŭ la 1-a de marto 1974.

Faru plezuron al viaj korespondantoj donacante al ili la novan kaj allogan legolibron AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO, kiu enhavas 2000 konversaciajn frazojn, parolturnojn, didaktikajn demandojn kaj respondojn, kaj 20 tutpaĝajn humorajn ilustraĵojn. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendokostoj: 10%. Mendu ĉe via-landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe

Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan beletraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankantan jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkuponon kompletan liston de siaj programoj.

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.



Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon

141 pj.
Poŝformata (22 x 12 cm)



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

Helsingør 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21. — 27. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la Kongreso de Hamburgo. Karavanvojaĝo el Helsingør al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝita per trajno speciala por la kursanoj. Programo senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

Ni kredu, ke venos tempo,

kiam la transpago estos ebla kaj ni rememoros pri la Fondaĵo "Canuto" kiel unu nobla, hela paĝo de la historio de la Esperanto-movado.

— membro en Bulgario

Dank' al la Fondaĵo Canuto mi ricevis la revuon. Mi ne havas sufiĉajn vortojn por rakonti mian ĝojon.

— membro en Indonezio

Via helpo estas granda por la Esperanto-movado en Litovio, ankaŭ por miaj gekursanoj.

— membro en Soveta Unio

Mi estas ege dankema al la Fondaĵo Canuto la eblecon membri kaj ricevi eldonaĵojn de UEA.

— membro en Egiptujo

Mi ne povas imagi mian vivon sen membreco de UEA, revuo, jarlibro ktp.

— membro en Rumanujo

La Fondaĵo CANUTO estas speciala konto, en kiun eniras mondonacoj kaj subvencioj, kaj el kiu UEA pagas la membrokotizojn de meritaj personoj en landoj, el kiuj ne estas eble libere transpago al Nederlando. Donacojn por Fondaĵo Canuto akceptas la Centra Oficejo kaj la landaj kotizperantoj de UEA.

HELPU REKLAMI



LA 59-AN

Universalan Kongreson en Hamburgo, uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan dukoloran glumarkon!

Folio po 10 markoj kostas 0,55 gld, aŭ frankite (por Nederlando: 0,60 gld afr).

Mendu ĉe UEA

OFERTO!

KVIN CENT (500!)

malsamaj poŝtmarkoj de Usono.

Ĉiuj estas grandformataj memorigaj


bildmarkoj. Prezo: 80 gld. Ĉi tiu stoko estas limigita.

Piaj ofertoj: - 400 malsamaj: 60 gld. 300 malsamaj:

40 gld. 200 malsamaj: 25 gld. Ĉiuj en bona stato.

La prezoj inkluzivas la sendokostojn kaj imposton

nederlandan. Mendu ĉe UEA. Rapidu! Ne maltrafu ĉi tiun specialan oferton!



Copernicus
1473 - 1973



8c US




U.S. POSTAL SERVICE 8c

Lyndon B. Johnson

United States
8 cents





LA TORNISTRO

-bona distro -
Jam aperis N° 1
kaj N° 2 kun tre
varia enhavo:
artikoloj,
rakontoj,
spritaĵoj,
recenzoj,
poemoj, ktp.
kun multaj
ilustraĵoj.
52 paĝoj.
22 cm.
Prezo: po 5 gld.
Mendu ilin ĉe
UEA, kaj ankaŭ
la jenajn verkojn

eldonitajn de Argentina Esperanto-Instituto:

KALEJDOSKOPA VARIETEO (prozo kaj
poezio) de Ergoto de Bonaero, 160p. 17cm.
Prezo: 9 gld.

JUNULEJO (Rememoroj de gimnaziano), kaj **LA
BUĈEJO** (novelo) 128p. 17cm. Prezo: 9,54 gld.

NIAJ PLEJ GRANDAJ VERKISTOJ (de Eo),
kaj **EKFLORADO ĈE PLATA RIVERO** (Pri la
Eo-movado) 112 p. 17 cm. Prezo: 7,50 gld.

LA KRIMO DE L'MILITO 212 p. 15 cm.
Prezo: 12,75 gld.

POR LA MONDPACO!

Mi amas KRISTON, ĉar per Siaj vortoj:
"amu vian proksimulon pli ol vin mem",
Li plenigis mian koron per frata mo por
ĉiu Terano.


Ĉiu el ni sekvu tiun ekzemplon! Tiam
MONDPACO subite ĉie ekestos!

Krimoj kaj militoj nenie plu eblos.

N. Droz-Pacmovado, pk 212,
CH-8047 Zuriko

MUZIKA SES—SES—BULTENO

Kvaronjare en Esperanto kaj la angla.



Jarabono \$4.00, studentoj kaj pensiuloj
\$3.00. Poŝtkesto 207, Purdin, Mo.64674
Usono

L. Mimó

'Kompleta lernolibro de regula Esperanto'

Analiza skolo

Paĝoj 189. Prezo 17,50 guldenoj.
Eldonis la aŭtoro, str. J. Comas 19,
Sabadell, Hispanujo.

"... detala, tre serioza studo de la tuta
lingvo, komparebla al la *Plena gramatiko*,
sed vi ja rigardas la tuton el tute alia
flanko, kio faras vian verkon aparte grava."

D-ro C. Stóp-Bowitz, Akademiano

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1974

Abonprezo:

1 jaro 6, — gld.

2 jaroj 9, — gld.

3 jaroj 12, — gld.

(Por Nederlando aldoniĝas
enlanda imposto 4%.)

Abonu ĉe:

Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando;
poŝta ĝirkonto: 37 89 64.

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino Ĉi

Specimeno akirebla senpage

